



EL POPOLA ĈINIO

Vortoj de Prezidanto Maŭ

Sur kian bazon ni devas meti nian politikon? Sur la bazon de niaj propraj fortoj, nome sinapogi sur la propraj fortoj. Ni ne estas izolitaj, kaj ĉiuj kontraŭimperiismaj landoj kaj popoloj de la tuta mondo estas niaj amikoj. Tamen ni emfazas sinapogon sur la propraj fortoj, kaj ni povas venki ĉiujn en- kaj ekster-landajn reakciulojn apogante nin sur la fortoj de ni mem organizitaj.




La granda gvidanto Prezidanto Maŭ faras ekstreme gravan paroladon en la Unua Plena Sesio de la 9-a Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

Granda Frukto de Sinapogo sur Propraj Fortoj

Sekvante la grandan instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “sinapogi sur la propraj fortoj, peneme lukti, rompi superstiĉojn kaj liberigi la penson” kaj disvolvante la revolucion spiriton de sentimeco, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Harbina Generatora Fabriko sukcesis fabriki en kelkaj mallongaj monatoj grandtipan 225,000-kilovatan akvoturbinan generatoran kompletan kun internacie progresinta nivelo.

Tiu generatora kompleto havas altecon je domego de sep etaĝoj kaj avantaĝojn de alta efiko, malalta produktkosto, bona kvalito kaj facileco en funkciigado. Por ĝin fabriki oni aplikis pli ol 20 novajn teknikojn, novajn teknologiojn kaj novajn materialojn. Ĝia sukcesa fabrikado plene montras la alte disvolvitan socialisman aktivecon kaj kreaĵon kapablon de nia laborista klaso, post kiam tiu ĉi klaso firme ektenis la gvidantecon.







Supre: La ĉefa akso de la generatora kompleto sub zorga prilaborado de laboristoj

Maldekstre: La laboristoj faras nun la lastan laborprocedon — provizadon de volvaĵoj al la statoro.

Sube dekstre: Kunveldado de finaĵoj de volvaĵoj





Laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de la unua laborejo interkonsiliĝas pri la problemo de konstruado de helpa generatoro al la 225,000-kilovata akvoturbina generatora kompleto.

Antaŭen sur la Vojo de Sendependeco kaj Memstareco, Sinapogo sur Propraj Fortoj

—*Pri la historio de la batalo inter la du linioj en la Luoĵang-a Traktora Fabriko*
“Ruĝas la Oriento”

EN sia batalo de dek ses jaroj kontraŭ la “filozofio de sklaveco antaŭ fremdlandanoj” kaj “rampismo” disvastigitaj de la granda renegato Liu Ŝaŭki, la vasta amaso de revoluciaj laboristoj de la Luoĵang-a Traktora Fabriko “Ruĝas la Oriento”, ĉiam persistas ĉe la granda orientilo de Prezidanto Maŭ de “**sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**”, tiel ke la teknika laboro en ilia fabriko senĉese antaŭeniras per firmaj kaj viglaj paŝoj laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ.

I


La konstruado de la traktora fabriko “Ruĝas la Oriento” komenciĝis antaŭ dek ses jaroj. La fakto, ke en la antikva urbo Luoĵang estis konstruata tiel granda fabriko tiutempe, plene montris la prosperon de la socialisma konstruado de nia granda patrio sub la saĝa gvido de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. En la komenca periodo de ĝia konstruado Ŝanhajo, la Nordoriento de Ĉinio kaj aliaj industria bazlokoj sendis siajn veteranajn laboristojn riĉajn je sperto por subteni tiun ĉi gravan konstruan punkton, kaj la vilaĝoj ambaŭborde de la Flava Rivero sendis siajn elstarajn gefilojn por partopreni la batalon sur la industria fronto. Dekoj da miloj da laboristoj “**kolektiĝis kunen por komuna revolucia celo**”, kaj ili decidis per sia tuta saĝo kaj tuta forto kons-

trui la unuan en Ĉinio traktorfabrikon kaj fabriki la unuan traktoron de Ĉinio. Ili diligente laboris tage kaj nokte, konstruis grandajn kaj altajn fabriksdomojn, instalis milojn da maŝinoj kaj akiris per mem elpensitaj rimedoj elstarajn sukcesojn en teknika renovigo kaj teknika revolucio.

Sed en la diligenta laborado, la laboristoj ĉiam pli kaj pli sentis, ke ili estas katenitaj en multaj flankoj. La rutinaj limigoj transprenitaj el fremdlandoj ĉiam pli kaj pli multiĝis, la administracia aparato fariĝis ĉiam pli kaj pli granda kaj la reguloj kaj sistemoj ĉiam pli kaj pli skolaslike komplikiĝis. Tia enkatenigo estis aparte serioza rilate al la teknika laboro. Proponoj elmetitaj de laboristoj pri teknika renovigo devis trapasi kelkdek procedojn de ekzamenado por ricevi sankcion kaj ofte ricevis neniun respondon eĉ post duonjaro aŭ unu jaro. Rilate al la projektado, provfabrikado kaj eksperimentado de produktaĵoj kaj la renovigo de instalaĵoj kaj tekniko, la laboristoj tute ne havis rajton diri ion.

Ĉio ĉi tio venigis serion da demandoj en la cerbon de la laboristoj:

Ĉu la teknika laboro en la fabriko devas esti farata per la kolektiva saĝo kaj kuna penado de la vasta laborista amaso aŭ per malmultaj homoj, kiuj sin fermas en kabineto for de praktiko?



Traktoroj amase produktitaj

Ĉu la teknika laboro de la fabriko devas elhaki novan vojon por la disvolviĝo de la industrio de Ĉinio mem aŭ malrapide rampi post la imperiismaj kaj reviziismaj landoj?

Kiu devas gvidi en la teknika kampo de la fabriko? Ĉu la vasta laborista amaso estas finfine mastro aŭ sklavo?

Tiuj demandoj esence temas pri tio, kiun linion efektiviĝi kaj kiun vojon iri en la teknika laboro de la fabriko. Ĉu persisti ĉe la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ pri sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj kaj enkonduko de amasa movado, aŭ antaŭenpuŝi la kontraŭrevolucion reviziisman linion de Liu Ŝaŭki en funkciigo de entrepreno, nome rampismon, filozofion de sklaveco antaŭ fremdlandanoj kaj administradon de fabriko pere de specialistoj?

II

Fine venis la tempo por disvolvi la senliman krean povon. En 1958 Prezidanto Maŭ ellaboris la Ĝeneralan Linion streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie. La brilo de la Ĝenerala Linio hele lumigis la Luojang-an traktoran fabrikon. La instrukcio de Prezidanto Maŭ “rompi la superstiĉojn kaj liberigi la penson” kuraĝigis la vastan laboristan amason marŝi al la teknika kampo — malpermesita kampo de la fabriko. Ekŝprucis la aktiveco de la laboristoj subpremita dum jaroj. En la spirito kuraĝi pensi, kuraĝi fari kaj kuraĝi revolucii ili ĵetis flanken multajn postrestintajn teknikajn procedojn kaj premis sub siaj piedoj multajn neraciajn teknologiajn aranĝojn. Revolucio estas lokomotivo, kiu

tiras la historion antaŭen, kaj la laborista klaso multe antaŭenpuŝis la historion de la tekniko de konstruado de traktoro.

Kiujn oni ne devas timi? Oni ne devas timi la fremdulojn, nek la "aŭtoritatulojn". Hu Hajliang, juna laboristo de la laborejo por stampado kaj premado antaŭnelonge veninta al la fabriko, vidis, ke la majstroj laboristoj, kiuj laboras ĉe la granda premilo importita el eksterlando, ĉiam enmetis kaj forprenis la prilaboraĵon per siaj manoj, kaj rimarkis, ke tio estas laciga kaj neseкура, kaj ke iliaj fingroj povas esti fortranĉitaj pro hazarda malatento. Opiniante, ke tia stato ne devas longe daŭri senŝanĝe, li decidis fari revolucion kontraŭ tiu importita maŝino! Li cerbumis tage kaj nokte, desegnis planojn, serĉis materialojn kaj faris eksperimentojn. Saĝo venas el laboro kaj kuraĝo venas el batalo. Kune kun kelkaj majstroj li fine kreis aŭtomatan instalaĵon por enmeti kaj forpreni la prilaboraĵon. La efektivigo de aŭtomatigo en tiu rilato multe malpliigis la laborintenson de la laboristoj, garantiis la sekurecon kaj plialtigis la produktivecon.

Tio estis la unua pafo en la teknika renovigo kaj teknika revolucio de la traktora fabriko kaj la unua pafo kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio. Tiu pafo frakasis la arogantecon de fremdlandaj dogmoj kaj rutinoj kaj forigis la katenon sur la penso de homoj. En la amasa movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio en la tuta fabriko rapide formiĝis alta tajdo de antaŭensaltego.

La laboristoj de la elektromotora grupo en la motora laborejo starigis la altan celon "forĵeti la fremdlandajn rutinojn por fari revolucion kaj nepre aŭtomatigi galvanizadon". Disvolvante la stilon de maltimo al laciĝo kaj kontinua batalado, ili sukcesis krei en 28 tagoj la unuan aŭtomatan linion por galvanizado en la produktado de traktoroj en Ĉinio kaj forĵetis la malnovan teknologion el fremdlando.

Estas speco de intern-denta frot-disko, kiu laŭ fremdlanda teknologio devas esti prilaborata sur granda tirtranĉa maŝino per tirtranĉilo pezanta 140 kilogramojn. Fremdlandaj "specialistoj" sinokupis pri ĝi unu jaron en la traktora fabriko, sed sukcesis fabriki nenion. Tamen kelkaj veteranaj laboristoj de iu malgranda riparstacio en la laborejo por stampado kaj premado kreive fabrikis ĝin per stampado anstataŭ tirtranĉado nur en du monatoj. Ĝi estas alta en kvalito kaj malalta en produkta kosto

kaj ĝia produktkvanto multoble plialtiĝis. Per la mirinda saĝeco la ĉinaj laboristoj skribis sian paĝon en la historion de teknologio de la mondo.

En malpli ol du jaroj pli ol 3,400 proponoj de teknika renovigo kaj teknika revolucio realiĝis en la tuta fabriko. Per grandaj paŝoj la laborista klaso suriris la arenon de tekniko. En la fabriko sume 18 laboristoj estis promociitaj kiel inĝenieroj. La vasta laborista amaso havas ne nur volon kaj kapablon por krei kaj inventi sed ankaŭ volon kaj kapablon por verki kaj resumi sian sperton. Dum sia klopodo pri teknika renovigo kune kun Hu Hajliang, la veterana laboristo He Fulin resumis la progresintan sperton akumulitan en la praktiko kaj verkis la libron *Aŭtomatigo de Stampado kaj Premado*. En la batalo por krei la aŭtomatan linion de galvanizado, la sturmanto de renovigo Ĉen Venhiang resumis la penojn kaj klopodojn de la kamaradoj de sia grupo kaj verkis la libron *Pendigilo por Galvanizado*. Tiuj libroj estis fruktoj de scienca eksperimento, de produkta batalo kaj ankaŭ de klasa batalo, kaj ili trovis varman akcepton kaj ŝaton de la vasta laborista amaso. La laboristoj diris: "Ni povas kompreni ilin kaj apliki ilin en praktiko tuj post legado. Ili estas centoble pli bonaj ol la fremdlandaj libroj. Tio estas la propraj libroj de ni laborista klaso!"

En la bolanta amasa movado, granda nombro da teknikistoj liberigis sin el sub la jugo de la kontraŭrevolucia reviziisma linio. Ili forlasis sian oficejon en granda domo kaj iris al la produkta fronto. Ili lernis de la laboristoj, kune kun ili batalis, elpensis bonajn rimedojn surloke kaj faris projektojn en laborejoj, kaj remuldante sian mondkoncepton kaj ludante sian teknikistan rolon.

En la periodo de la granda antaŭensalto, sub la direkto de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ pri **sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**, por multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui socialismon, la vasta laborista amaso je tri jarkvaronoj pli frue efektivigis la konstruan planon, tiel ke la unua granda traktora fabriko de nia lando komplete komencis sian produktadon en novembro, 1959.

III

La vojo antaŭen ne estis ebena, kaj la klasbatalo en la Luojang-a Traktora Fabriko "Ruĝas la Oriento" ĉiam daŭris kun alternaj leviĝoj kaj malleviĝoj.

En aprilo de 1960, kun ĝisosta malamo kontraŭ la proletara revolucia linio, la granda renegato Liu Ŝaŭki venis al tiu ĉi fabriko. Li morte malamis kaj ekstreme timis la grandajn atingojn akiritajn de la vasta laborista amaso per sinapogo sur propraj fortoj en la granda antaŭensalto. Li plenenergie predikis “rampismon” kaj “administradon de fabriko pere de specialistoj”, provante regresigi la fabrikon for de la socialisma vojo al la kapitalisma vojo. Ekde tiam la granda batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj en la scienc-teknika kampo en tiu ĉi fabriko des pli akre disvolviĝis.

La renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki ne volis sendependecon kaj memstarecon sed filozofion de sklaveco antaŭ fremdlandanoj, kaj ne volis sinapogon sur propraj fortoj sed rampismon. Spite al la forta kontraŭstaro de la vasta laborista amaso, plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ofertis, pli febre ol antaŭe, tiujn kontraŭrevoluciajn varojn. La vasta amaso de kamparanoj urĝe bezonis traktoron propran al Ĉinio, kiu konformas al la klimato kaj terformo de nia lando kaj taŭgas por sinteza utiligo. Sed la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” alkroĉiĝis al la postrestintaj produktoj de la reviziisma lando, apogante sin al la de ili uzurpita povo. La kvalito de iuj partoj kaj akcesoraĵoj de traktoro estis nebonaj. Kamparanoj venis de miloj da lioj por aĉeti aŭ ripari ilin, sed ofte malesperigis. Ĉar tiuj “aŭtoritatuloj” opiniis, ke tiuj partoj kaj akcesoraĵoj estas bagateloj kaj ne valoras ilian penadon por fari zorgeman projekton aŭ reformon. Krome, ili eĉ dehakis laŭplaĉe la fruktojn de la sukcesa kreado de la laborista klaso, kiujn la lasta akiris en la jaroj de granda antaŭensalto sin apogante sur propraj fortoj. Okdek procentoj de pli ol 3,000 objektoj de teknika renovigo kaj teknika revolucio, estis ĵetitaj flanken. Pro la firma kontraŭstaro de la laboristoj, parto el tiuj objektoj ne povis esti dehakitaj. Tiam ili aplikis tre venenan rimedon ne rekoni la laŭleĝan pozicion de tiuj objektoj, ne fari por ili riparojn kaj ne provizi al ili akcesoraĵojn por ke la lastaj vegetu per si mem.

La granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj klopodis per plena energio efektiviĝi rampismon kaj filozofion de sklaveco antaŭ fremdlandanoj, kaj la laboristoj brave donis al ili rebaton. Kiam plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la

kapitalisman vojon okazigis specialan kunvenon, ordonis restarigon de la tuta fremdlanda teknologio kaj volis malkonstrui la aŭtomatan linion de galvanizado, la galvanizaj laboristoj leviĝis por defendi ĝin pintokontraŭpinte:

“Ni faris tion laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. Neniu rajtas ĝin malkonstrui!”

La revolucia heroeco de la laborista klaso por persisti ĉe **sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj** subigis la arogantecon de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj”. Nelonge poste la metilernantoj de la laborejo de oleaj pumpiloj kreis kompleksan tranĉilon, kiu estis nehavebla tiutempe en aliaj lokoj de la mondo; la veteranaj laboristoj de la Branĉa Fabriko por Muldado kreis la progresintan teknikon de malvarma veldo de muldaĵoj; la junaj laboristoj de la instrumenta laborejo kreis la novan teknikon de elektroskoria surkovra veldo por forĝmuldilo.... Ĉio ĉi tio donis solidan vangfrapon al la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki.

En 1964 nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la alvokon: **“Ni ne devas iri la malnovan vojon de aliaj landoj de la mondo en disvolvo de tekniko kaj rampadi paŝon post paŝo post la aliaj. Ni nepre devas rompi la rutinojn kaj plejeble apliki progresintajn teknikojn por konstrui nian landon en modernan socialisman potencan landon en ne tro longa historia periodo.”** La vasta amaso de laboristoj de la tuta fabriko estis multe kuraĝigitaj kaj baldaŭ kreis aliajn progresintajn produktaĵojn kiaj framo de nova tipo, ktp., kaj ankoraŭfoje faris fortegan sturmon kontraŭ la filozofio de sklaveco antaŭ fremdlandanoj kaj la rampismo predikitaj de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki.

IV

La ŝtormo de la Granda Proletara Kultura Revolucio envolvigis la Luojang-an traktoran fabrikon. La flama indigno akumuliginta en la vasta amaso de revoluciaj laboristoj longe subpremata de la kontraŭrevolucia reviziisma linio erupciis kvazaŭ vulkano. Ili brave leviĝis kaj ribelis kontraŭ plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, reprenis la de ili uzurpitan parton da povo kaj starigis revoluciajn komitatojn de diversaj niveloj. La laborista klaso fariĝis vera mastro de la fabriko.

Sub la rekta gvido de la revolucia komitato de la traktora fabriko, la revoluciaj laboristoj de la Branĉa Fabriko por Motoroj elmetis la sonorajn sloganon "La laborista klaso ĵuras repreni al si la potencon super tekniko", ĵetis flanken la administran aparaton pri tekniko longdaŭre regatan de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj", starigis la unuan en la tuta fabriko scienc-esploran, eksperimentan kaj reforman stacion de triflanka kombiniĝo kun laboristoj kiel ĉefa konsistiga parto kaj la partopreno de revoluciaj teknikistoj kaj revoluciaj kadroj, proklamis la reprenon de la potenco super tekniko kaj, kiel mastro, komencis propramane fari solidan klopodon en projektado, provfabrikado, eksperimentado kaj plibonigo de la motoro — koro de la traktoro — sur la plejfronto de produktado.

Ekposedinte la potencon super tekniko, la laborista klaso firme efektivigis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Ili gravuris en la koron la instruon de Prezidanto Maŭ "Sinapogi sur propraj fortoj, peneme lukti, rompi la superstiĉojn kaj liberigi la penson", komplete frakasis rampismon kaj filozofion de sklaveco antaŭ fremdlandanoj, levis grandiozan alttajdon de teknika renovigo kaj teknika revolucio kaj kreis miraklojn neimageblajn por la burĝaraj filistroj kaj dekstraj konservativuloj. La Branĉa Fabriko por Moto-

roj uzis tri monatojn por sukcese projekti kaj provfabriki solcilindran motoron, kiun la burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj" ne sukcesis fabriki dum dekelkaj jaroj. Eksperimento pruvis, ke ĝia efiko estas stabila kaj certa, kaj ke ĝi estas de alta precizeco. Tio metis solidan fundamenton por la provfabrikado de seriaj produktaĵoj. La Branĉa Fabriko por Muntado sukcese projektis kaj provfabrikis ĉasion de nova tipo — gravan parton de traktoro — kaj tiel solvis la demandon de produktado de tiu parto — demandon malnovan kaj malfacilegan ekzistantan ĉe post la starigo de tiu ĉi traktora fabriko. La Branĉa Fabriko por Oleaj Pumpiloj sukcese projektis kaj provfabrikis rapide-reguligilon por seria ole-pumpilo n-ro 2. Ĝia kvalito kaj kapablo superis tiun el eksterlando. En la tempo de la venka okazigo de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, la Branĉa Fabriko por Normaj Partoj sukcese provfabrikis la unuan en nia lando senpintan drat-tiran maŝinon de granda tirkapablo kaj tiamaniere plenigis vakan punkton en la scienco kaj tekniko de nia lando.

"La Granda Proletara Kultura Revolucio estas potenca movforto por disvolvi la sociajn produktajn fortojn en nia lando." Sub la direkto de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ aperas tute nova situacio tiel en la teknika kampo kiel ankaŭ sur la produkta fronto de la Luojang-a traktora fabriko.

KURANTAJ AFEROJ


ŜANHAJO SUKCESE PROVPRODUKTIS ALTPRECIZAN ŜAFTON PER MALVARMA LAMINATADO

Kuraĝigite de la eksterordinare granda ĝojiga novaĵo pri la solena malfermiĝo de la Naŭa Kongreso de la Partio, laboristoj de la Kvina Ilmaŝina Fabriko de Ŝanhajo sukcese produktis per malvarma laminatado duaklasan ŝafton de progresinta monda nivelo sen metaltranĉo post dek-tagnokta penlaborado.

Ŝafto estas nemalhavebla grava movparto de ilmaŝinoj. La teknologio de malvarma laminatado de ŝaftoj estas pinta en la nuna maŝinfarado de la mondo. Ĝi distingiĝas

per tio, ke la produktivo estas alta, la produktaĵoj estas fortikaj kun altgrada glateco, la kvanto de la bezonata materialo estas malgranda kaj la manipulado estas simpla.

La grupo de triflanka kombiniĝo de la Kvina Ilmaŝina Fabriko de Ŝanhajo ĉiam persistis en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedong-penso dum konkero de tiu ĉi pinta teknologio de la mondo kaj vaste aŭskultis opiniojn de laboristoj, koncentris la bonajn ideojn kaj persiste faris laŭ ili. Ili levis la precizecon de malvarme laminatita ŝafto de la tria klaso ĝis la dua kaj altigis la glatecon ĝis pli ol ok gradoj kaj tiel faris novan kontribuon al la senmetaltranĉa teknologio de nia lando.



Malgranda lokomotivo mem konstruita

Himno al Sinapogo sur Propraj Fortoj

— Pri peniga entreprenado de la ripara kaj fabrika laborejo de la
Fuĝoŭvan-a Argilminejo de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio

ANHIN

ĈE la bordo de Bohaj-marĉo troviĝas minejo, nome la Fuĝoŭvan-a Argilminejo de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio.

Sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”, la laboristaj amasoj

de la ripara kaj fabrika laborejo de la minejo pene luktis dek du jarojn en la intensa batalo inter la du linioj; aplikante siajn tradiciajn rimedojn kaj utiligante la nurajn kvar malnovajn tornilojn de la minejo, ili sukcesis fabrikigi pli ol 400 meĥanikajn ekipaĵojn de pli ol 60 specoj, ekipis sin per

tiuj kaj tiel atingis plenan memprovizon de maŝinpartoj kaj fundamente efektivigis meĥanikan produkton.

IRI LA PROPAN VOJON


La Fuĝoŭvan-a Argilminejo de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio estas malnova minejo. Antaŭ la Liberigo, pro tio ke la reakcia reganta klaso kruele subpremis kaj ekspluatis la laboristojn kaj klopodis nur minekspluati sed malzorgis vivon aŭ morton de la laboristoj, la tieaj laborkondiĉoj estis tre malbonaj. Post la Liberigo, la laborista klaso fariĝis la mastro de la lando. Tamen, la granda renegato, granda interna spiono kaj granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj delonge plenenergie antaŭenpuŝis sklavecon antaŭ fremdlandanoj kaj rampismon, tiel ke la argilminejo ankoraŭ heredis la pasintajn postĝintajn metodojn en minekspluatado kiaj fosado per pioĉoj, dorsportado kaj ŝultroportado. Granda estis la labora intenseco sed malalta estis la produktiveco, kaj la bezonoj de la ĉiam pli kreskanta disvolviĝo de la ferŝtala produktado tute ne povis esti kontentigitaj.

En 1958, la montskua batala tamburado de la granda antaŭensalto vekis tiun ĉi malnovan minejon. Kuraĝigate de la Ĝenerala Linio de la Partio **“streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**, la revoluciaj laboristoj de la laborejo decidis fabrikati ekipaĵojn per siaj propraj manoj kaj efektivigi meĥanikan produkton de la minejo por liberigi siajn klasajn fratojn el la peza fizika laboro.

Sed la revoluciaj agoj de la laboristaj amasoj renkontis senskrupulajn malhelpojn kaj subfosadojn de la plenmano de enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝaraj teknikaj **“aŭtoritatuloj”**. Kolerante pro embaraso ili diris: **“Pri ekipaĵo vi ne zorgu. Pri tio la**

ŝtato havas sian planon kaj ni kompreneble faros nian aranĝon.” Fine, ili sendis al Ŝenjang por mendi ĉentransportilon ok tunojn pezan kaj pli ol metron altan. Tia maŝino neniel povis esti instalita en la malalta galerio, por ne paroli pri uzado. Informiĝinte pri tio, la laboristoj de la ripara kaj fabrika laborejo flamis de kolero kaj diris: **“Ni neniel devas fidi mandarenajn moŝtojn kaj burĝarajn specialistojn. Por ŝanĝi la postrestintan fizionomion de la minejo ni devas apogi nin nur sur Maŭzedongpenso, sur la revolucia spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj de strebado**

Centtuna premmaŝino konstruita per propraj fortoj



al potenciĝo.” Kaj en alta batalspirito ili ĵetis sin en la lukton por provfari ĉentransportilon.

La materialo, ekipaĵo kaj tekniko bezonataj por provfarado de la ĉentransportilo mankis al ili kaj devis esti akiritaj per diligenta laboro. Aperis malfaciloj post malfaciloj. Post luktado en kelkaj sinsekvaj tagnoktoj kaj dank’ al la kolektiva saĝo kaj komuna penado, la laboristoj fine fabrikis la unuan ĉentransportilon. Tamen, ĝi malsukcesis en provfunkcio en galerio.

Tiam la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj” denove elsaltis kaj malice ĝojis: “Ni ja diris ke vi estas ne kompetentaj! Se vi kapablas ĝin fabrikigi, por kio oni konstruas maŝinfabrikejojn?” Kaj sub la preteksto de malutilo al la produktado, ili malpermesis al la laboristoj plue eksperimenti.

La malfaciloj neniel povis timigi la laboristan klason de Ĉinio armitan per Maŭzedongpenso. Sub forta subteno de la ŝaktaj laboristoj, la laboristoj de la laborejo klopodis en sia praktikado trovi la leĝojn de la naturo por ĝin konkeri, prenis lecionojn el la malsukcesoj, resumis spertojn post sukcesoj, kaj post tagnokta penema luktado dum pli ol unu monato ili fine sukcesis fabrikigi la ĉentransportilon. En la malnova minejo unuafoje aŭdiĝis bruado de transporta maŝino.

POR LA REVOLUCIO ILI KURAĜIS FABRIKI ANKAŬ LOKOMOTIVON

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Ni povas ellerni kion ni ne komprenis antaŭe. Ni bone kapablas ne nur detrui la malnovan mondon, sed ankaŭ konstrui novan mondon.”** Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, strebante al potenciĝo kaj kuraĝante sturmi, la laboristoj de la ripara kaj fabrika laborejo fabrikis per siaj propraj manoj malgrandan lokomotivon kun tirforto de 42 tunoj.

En la pasinteco, la argilminejo uzis kadukan lokomotivon postlasitan de la malnova socio, kio serioze malhelpis la plenumon de transporta tasko. En la viveplena periodo de la granda antaŭensalto, solvi la problemon de surtera transportado fariĝis tre urĝa. Tiam, la laboristoj de la ripara

kaj fabrika laborejo denove faris ĵuron: “Se nur tion bezonas la revolucio, ni kuraĝas fabrikigi ankaŭ lokomotivon!” Dirite, farite. En printempo de 1961, ili klarionis la lukton por fabrikigi lokomotivon.

Prilaboro de cilindro de lokomotivo postulas altan precizecon kaj altnivelan teknikon. Tion kaptante iuj burĝaraj filistroj kaj dekstremaj konservativuloj disemis malkuraĝigojn: “Simile al la postaĵo de tigro, tia laboro estas netuŝebla. Ke vi volas prilabori cilindron per la kaduka rimena tornilo, tio estas nur sonĝo en la tago.” Tion aŭdinte, veterana tornisto Sun Jijuan diris kun decidemo: “Ĉu la postaĵo de tigro estas netuŝebla? Mi tamen nepre ĝin tuŝos!” La ĉiamvenka Maŭzedongpenso donis al tiu ĉi veterana laboristo neelĉerpeblan saĝon kaj forton. Li ne nur ellaboris cilindron kun alta precizeco per la malnova tornilo, sed ankaŭ atingis tion, ke ĝia glateco superis la postulatan normon.

La laboristoj de la ripara kaj fabrika laborejo havas ne nur la sentiman revolucionan spiriton kuraĝi pensi, kuraĝi agi kaj kuraĝi sturmi, sed ankaŭ striktan sciencan sintenon. Kiam ili entreprenis fabrikadon de la kaldronego de la lokomotivo, reacia teknika “aŭtoritatulo” ilin timigis: “Vi ne havas precizajn mezurajn aparatojn por fari kontrolojn. Se la kaldronego estos ne laŭnorma, ĝi mortigos homojn per sia eksplodo!” La laboristoj tute ne aŭskultis lin. Ili diris kuraĝe: “Agi laŭ Maŭzedongpenso estas la plej alta normo!” Kun alta politika konscio kaj revolucia deviento **ekskluzive** kaj **senrezerve** servi al la popolo, la laboristoj kuraĝe entreprenis la fabrikadon, ĉiam strebis al pli alta nivelo, zorgeme faris kontrolojn sen ajna neglekto kaj fine sukcesis fabrikigi kaldronegon por lokomotivo.

En la 1-a de julio de 1961, kiam la ruĝa suno ŝprucis el la oriento, la lokomotivo ekkuris en ĝia brilo, kvazaŭ galopanta ĉevalo.

LA SPIRITO SINAPOGI SUR PROPRAJ FORTOJ HEREDIĜAS DE GENERACIO AL GENERACIO

En la senprecedenca Granda Proletara Kultura Revolucio kaj en la alta tajdo de la granda amasa

movado de batalo, kritiko kaj reformo, de tempo al tempo venis novaj triumfaj novaĵoj el la ripara kaj fabrika laborejo de la Fuĝoŭvan-a Argilminejo sur la vojo de sinapogo sur propraj fortoj.

La centtuna premaŝino, kiun la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon malpermesis fabriki en la pasinteco, ĝuste estis sukcese provfarita en la granda kultura revolucio. La framo de tia maŝino devas esti muldita el ŝtalo, sed la ripara kaj fabrika laborejo ne posedis ekipaĵon por muldi ĝin. La malfacilo ne povis timigi la laboristan klason harditan en la Granda Proletara Kultura Revolucio. La laboristoj kolektis el la ferrubejo pli ol cent ŝtalplatajn restaĵojn kaj decidis mem veldi ilin.

Tiam, juna laboristo Li Ĵenfu opiniis, ke la laboristoj jam tenas la regpotencon kaj ne bezonas uzi tian mizeran metodon, kaj li proponis fari la framon el novaj ŝtalplatoj. Veterana laboristo diris al malgranda Li signifoplene: “Antaŭe ni iris la vojon de sinapogo sur propraj fortoj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, kaj nun post ekteno de la regpotenco ni pli devas iri tiun ĉi vojon. Se ni tiun ĉi vojon ne irus, ni fariĝus reviziistoj!” Tion aŭskultante, malgranda Li pensis pri la granda instruo de Prezidanto Maŭ **sinapogi sur propraj fortoj**, profunde sentis sin erara kaj firme esprimis: “La vojon de sinapogo sur propraj fortoj montritan de Prezidanto Maŭ ni juna generacio iros definitive!” Kaj kune kun la veteranaj laboristoj, Li Ĵenfu senĉese laboris pli ol duonmonaton spite al la varmeĝo en somero kaj fine kunveldis la pli ol cent ŝtalplatojn en grandan framon 1.5 metrojn altan kaj 1.5 tunojn pezan.

“Dank’ al sinapogo sur propraj fortoj ni ŝanĝis la postrestintan fizionomion de la minejo. Tiun ĉi larĝan vojon ni nepre firme iros plue, de generacio al generacio senhalte.” Tio jam fariĝis la komuna ĵuro de la laboristoj de la ripara kaj fabrika laborejo.

Dum la 12 jaroj, la laboristaj amasoj de la ripara kaj fabrika laborejo de la Fuĝoŭvan-a Argilminejo entreprenis la movadon de teknika revolucio kaj teknika renovigo, plene utiligis la latentan forton de produkto kaj atingis grandajn sukcesojn, disvolvante la kreivan spiriton kaj revolucian heroecon. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj diris: “Se oni aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ, ili povas obeigi maŝinon, por ke ĝi fabriku kion ili volas. Ĉiuj niaj atingoj estas grandaj venkoj de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso.”

Disvolvante la spiriton de kuraĝo en penso kaj ago, la laboristoj sin okupas energie pri teknika renovigo.



Ŝanĝiĝo de Fiŝista Vilaĝo

GUANG BO

APUD la Orienta Rivero sur la delto de Perlo-rivero en nia Guangdong-provinco, sin trovas avangarda kolektivo de fiŝistoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso — fiŝkaptaj brigado de Tieĉang-komunumo de Boluo-gubernio. Kun senlima fidelo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĝiaj malriĉaj fiŝistoj kaj malsuperaj mezfiŝistoj solide disvolvas amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, kaj atingis novan nivelon en siaj studo kaj apliko kaj fariĝis brila modelo de la tuta provinco en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso.

LA KORO DE FIŜISTOJ INKLINAS AL PREZIDANTO MAŬ

La fiŝkaptaj brigado situas apud Tieĉang-rivero — branĉo de la Orienta Rivero. La tuta brigado konsistas el 63 fiŝistaj familioj, inter kiuj 53 familioj estas malriĉ-fišistoj kaj malsuperaj mezfiŝistoj. Antaŭ la Liberiĝo, ili ĉiuj tutjare vivis sur akvo en kaduka boato kun eluzita reto. Sur Tieĉang-rivero longa je pli ol dek kilometroj, bienuloj, fiŝkaptaj tiranoj, banditoj kaj kuomintanga reakciularo starigis 12 doganejojn por kruele ekspluati, subpremi kaj prirabi la malriĉajn fiŝistojn. La lastaj diris, ke tiu ĉi rivero estas “amara rivero”, en kiu ili ĉiuj verŝis sangon kaj larmojn!

La oriento ruĝiĝas, kaj la suno leviĝas. Sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto

Maŭ, la ĉina popolo liberiĝis, kaj la amara rivero fariĝis feliĉa rivero. La fiŝistoj, kiuj en la malnova socio povis vivi nur sur akvo, komencis fiksloĝi sur la tero kaj suriris la vojon de kolektivigo, kiu kondukas al kuna riĉiĝo.

La fiŝistoj ĉe Tieĉang-rivero ne forgesis la kompartion post sia liberiĝo kaj ne forgesis Prezidanton Maŭ en feliĉo. Ili ĉiuj persiste kaj peneme studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj revolucias sekvante lin.

La maljuna fiŝisto Hju Diĵong, kiu vivis sur Tieĉang-rivero pli ol okdek jarojn, remis por fiŝkaptaj tiranoj kaj kapitalistoj dum la plejparto de sia vivo antaŭ la Liberiĝo. Hodiaŭ, la kvar familioj de liaj tri generacioj ĉiuj estis elektitaj kiel “familioj plene ruĝaj”, kiuj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson. Hju Diĵong havas plej profundan proletaran senton al la granda savanto Prezidanto Maŭ. En la Granda Proletara Kultura Revolucio li fervore studas Maŭzedongpenson kaj kuraĝe defendas la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, kaj en sia aĝo de 83 jaroj li glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Li persone faris 4 nigrajn tabulojn por surskribi vortojn de Prezidanto Maŭ por la familioj de siaj 4 filoj kaj instigis la filojn kaj genepojn ĉiutage studi instruojn de Prezidanto Maŭ. Li ĉiam portas kun si sakon kun trezoraj verkoj de Prezidanto Maŭ kaj ilin ĉie studas. Li diris: “Se nur miaj okuloj ankoraŭ kapablas vidi, mi plenkore legos verkojn de Prezidanto Maŭ; se nur miaj manoj kaj piedoj

ankoraŭ kapablas moviĝi, mi agos laŭ instrukcioj de Prezidanto Maŭ; se nur mi ankoraŭ ne haltigas mian lastan spiron, mi fervore propagandos Maŭzedongpenson.” En printempo de la kuranta jaro, kiam li kuŝis en hospitalo pro serioza malsano, li ankoraŭ venigis la filojn kaj genepojn al si por kune studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj foje-refoje admonis ilin ĉiam fideli al Prezidanto Maŭ.


La tri generacioj de Hju Dijong ĉiuj senlime fidelas al Prezidanto Maŭ. La estro de la fiŝkaptabrigado Hju Kun estas lia filo kaj ĉijare 46-jara. De sia knabeco li okupiĝas pri fiŝkaptado kaj kreskis en la amara akvo de Tieĉang-rivero. Same kiel lia patro li havas ruĝan koron senlime fidelan al Prezidanto Maŭ. Li neniam vizitis lernejon, sed por posedi la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson, li ofte noktmeze vekis sian junan filon Hju Honggin por ke la lasta instru lin. Por instigi sian filon pli varme ami Maŭzedongpenson, iutage, per fiŝboato Hju Kun portis la filon al la tombo de la avino sur rivera bordo, kiu mortis en la pasinteco pro malsano kaj mizero, kaj rakontis al li la pasintecon de fiŝistoj en la malnova socio, plenan de sango kaj larmoj. Hju Kun diris al la filo: “Kvankam vi scipovas legi, sed vi ne konas la mizeron en la malnova socio kaj ne komprenas la feliĉon en la nova socio. Ni, infano mia, povas preventi la kapitalisman restaŭron kaj ne resuferi la pasintan mizeron, nur se ni peneme studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj revolucias strikte sekvante lin!” De tiam Honggin pli diligente helpas la patron studi verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj ankaŭ li mem estas elektita kiel aktivulo en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.

La senlima fidelo de la tri generacioj de Hju Dijong al Prezidanto Maŭ kaj ilia obstina penado en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ estas miniaturo de la fiŝkaptabrigado. El tiu brigado 139 personoj estas elektitaj kiel aktivuloj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.

TUJ APLIKI LA LERNITAĴON EN PRAKTIKO

La malriĉ-fiŝistoj kaj malsuperaj mezfiŝistoj de la fiŝkaptabrigado legas instruojn de Prezidanto Maŭ per la buŝo, gravuris ilin en la cerbon kaj praktikas ilin en agoj. Ili diris: “Nur tuj apliki la lernitaĵon efektive en praktiko signifas vere fideli al Prezidanto Maŭ. Kiam oni ion lernis, oni devas ĝin tuj apliki. Apliko estas revolucio.”

Komunumanoj de la fiŝkaptabrigado rikoltas grasajn fiŝojn mem breditajn.





En junio de la pasinta jaro, la Orienta Rivero ŝvelis subite, senfina superakvego torentis en domojn de la brigado. Tiam aperis danĝera stato ankaŭ ĉe la kontraŭinunda digo de la najbara brigado kaj serioze minacis pli ol 6000 muojn da rizkampoj. Studinte la instruojn de Prezidanto Maŭ **“kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem”** kaj **“ni devas stimuli la zorgadon pri la interesoj de la tuto”**, la fiŝistoj, viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj junuloj, ĉiuj kuris al la digo por fari urĝan savon, postlasante siajn proprajn posedaĵojn kaj domojn en danĝero. Proksime de la danĝera loko de la digo, la fiŝkapta brigado havas 28 muojn da nove kulturataj rizkampoj kaj pli ol 60 muojn da fiŝlagetoj. La superakvego senĉese leviĝis, kaj la digo troviĝis en danĝero esti breĉita de la akvego. Ĉe tiu kriza momento la malriĉ-fiŝistoj kaj malsuperaj mezfiŝistoj de la fiŝkapta brigado decidis breĉi sian digeton por dividi la akvon kaj konduki ĝin al siaj fiŝlagetoj kaj rizkampoj. Tiufoje, kvankam pli ol

10,000 ĝinoj da tuj rikoltota rizo estis dronigitaj kaj la fiŝoj en la lagetoj kun areo de pli ol 60 muoj estis forportitaj, tamen la digo estis sekurigita, tiel ke la pli ol 6000 muoj da rizkampoj de la najbara brigado estis ne damaĝitaj kaj ankaŭ la serioza minaco al la vivoj kaj posedaĵoj de kamparanaj amasoj de kelkaj aliaj brigadoj estis forigita.

En tiu brigado, viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso jam fariĝis konscia ago de ĉiu fiŝisto.

En junio de la pasinta jaro, kiam la maljuna fiŝisto Vu Junpej remis boaton preter Libo-kluzo fore de la brigado je pli ol dek lioj, li trovis grandan truon sur la digo apud la kluzo, kie la akvo estas profunda kaj la fluo rapida. Pro la truo jam formiĝis forta akvokirlo. Se oni ne tuj ŝtopus ĝin, la eventuala falo de la digo kaŭzus inundon al dekmiloj da muoj da kampoj. Sed por ŝtopi la truon, estis danĝero esti englutita

de la akvokirilo. Tiam, sub la kuraĝigo de la instruo de Prezidanto Maŭ **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**, Vu Ĵunpej decideme saltis en la akvon kaj ŝtopis la truon per sabloplenigitaj sakoj ĵetitaj de sur la bordo.

La fiŝkapta tereno de la brigado ampleksas kelkcent kilometrojn. Kvankam ili ofte kaptas fiŝojn dise, tamen de la lastaj jaroj, kien ili venas, tie ili studas kaj aplikas Maŭzedongpenson. En nokto, kiam mankas al ili lampo en sovaĝejo, ili studas sub la lumo de bruligataj pinbranĉoj; pro manko de nigra tabulo, ili skribas per kreto instruojn de Prezidanto Maŭ sur kunportataj nigraj litkovriloj dum studado. Fiŝkaptante en diversaj lokoj, ĉiu produkta grupo havas sian gvidanton por studi verkojn de Prezidanto Maŭ, kiu ĉiam ĉeloke propagandas kaj helpas la amasojn vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson.

En la vilaĝo, memkonscia laboro jam fariĝis moro. Oni povas ofte vidi ke iuj ŝultroportas korbojn por kolekti fekaĵon kaj senanonce ĵetas ĝin en fiŝlagetojn de la brigado; aliaj senbrue balaas necesejojn de la brigado; 70-80-jaraj fiŝistoj diligente riparas fiŝretojn por la kolektivo; kaj elementaj lernantoj post lernohoroj memvole partoprenas kolektivajn laborojn. . . .

INICIATANTO POR IRI LA SOCIALISMAN VOJON

En la batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj, alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpensoj la partia filio de la fiŝkapta brigado donis bonan ekzemplon en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpensoj, en efektivaigo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, en batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo, agante kiel iniciatanto por iri la socialisman vojon.

En la jaro 1962, kiam iu enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon en la komunumo devigis la fiŝkaptan brigadon “fiksi produktan kvoton al ĉiu fiŝboato”, la sekretario de la partia filio Vu Joŭfu kaj la vasta amaso de malriĉfiŝistoj kaj malsuperaj mezfiŝistoj tion rifuzis firme. La potenctenanto riproĉis Vu Joŭfu pri neplenumo de instrukcio de la “supera instanco” kaj minacis lin per eksigo el la Partio. Vu Joŭfu firme respondis: “Jam definitive farita estas mia decido por konduki la komunumanojn iri laŭ la socialisma vojo montrita de Prezidanto Maŭ!”

Ekde sia enoficiĝo kiel kadro, Vu Joŭfu sekvas la instruon de Prezidanto Maŭ kaj neniam apartiĝis de la amaso kaj fizika laboro. La vastaj amasoj de malriĉfiŝistoj kaj malsuperaj mezfiŝistoj laŭdis: “Vu Joŭfu plej bone faras fizikan laboron kaj estas senegoisma. Li ĉiam aperas tie, kie estas malfaciloj, kaj vere estas bona sekretario de partia filio, kiu agas ĉiam laŭ instruoj de Prezidanto Maŭ.”

Sub la influo de Vu Joŭfu, ankaŭ la aliaj kadroj-partianoj persistas en egala laboro kontraŭ egala rekompenco kaj dividas dolĉon kaj amaron kun la komunumanoj, servante kiel modeloj por la amasoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpensoj. Hju Honggen, kiu estis elektita kiel vicsekretario de la partia filio en la pasinta jarfino, havas nur pli ol dudek jarojn. Plena de vicleco li klopodas armi la amasojn per Maŭzedongpensoj. Kiam li trovis, ke Deng Ti, filo de malriĉfiŝisto Deng Ĉenghe, estis sufiĉe profunde influita de la nigra teorio de la granda renegato Liu Ŝaŭki “viziti lernejon por fariĝi estro”, li faris al Deng Ti edukon de klasa batalo kaj batalo inter la du linioj, en formoj de kurso de Maŭzedongpensoj formita de kelkaj familioj kaj de korverŝa interparolo, kaj tiel helpis tiun elimini la venenan influon de la nomita teorio en la cerbo kaj starigi la penson viziti lernejon por la revolucio. Deng Ti finfine estis elektita kiel aktivulo en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpensoj.

En la jarfino de 1968, kiam oni elektis aktivulojn en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpensoj, ĉiuj partianoj de la brigado estis elektitaj kiel aktivuloj.

De multaj jaroj, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“sinapogi sur propraj fortoj”**, la partia filio de la fiŝkapta brigado gvidas la fiŝistojn en produktado kaj en konstruado de nova socialisma vilaĝo. Per pli ol 130 homfortoj kaj post penigaj bataloj en kelkaj sinsekvaj vintroj kaj printempoj, la fiŝistoj konstruis domojn kun pli ol 70 ĉambroj per membakitaj brikoj kaj tiel efektivigis fiksloĝigon sur la tero. Samtempe, sur herboplenaj riverebenejoj ili elfosis pli ol 200,000 kubmetrojn da tero kaj tiel konstruis pli ol 130 muojn da fiŝlagetoj kaj pli ol 30 muojn da rizkampoj. La kolektiva akumulo kreskis de pli ol 8,000 *yuan* ĝis pli ol 100,000 *yuan*.

Nun, la fiŝkapta brigado pluapaŝe levas novan tajdon de amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpensoj kaj brave antaŭenmarŝas daŭre laŭ la brila vojo montrita de Prezidanto Maŭ!

Denova Riĉa Rikolto de Tritiko en Nia Lando

SUB la direkto de la granda strategia orientilo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”, nia popolo gajnis multajn venkojn unu post alia en “tenado de la revolucio, stimulado de la produkto”, alte tenante la unuiĝan kaj venkan standardon de la Naŭa Kongreso de la Partio. Kaj ĉijare, nia lando akiris denovan riĉan rikolton de tritiko en la ĉefaj tritikaj regionoj.

PLENAMPLEKSA RIĈA RIKOLTO DE SOMERE Maturiĝantaj Plantaĵoj en la Antaŭurboj de Pekino

La pli ol du milionoj da muoj da tritiko kaj frue maturiĝantaj plantaĵoj en la antaŭurboj de Pekino etendiĝantaj de la Granda Muro ĝis la bordoj de Ĉaŭbaj-rivero kaj Jongding-rivero atingis plenampleksan riĉan rikolton. En la kuranta jaro, riĉan tritikan rikolton akiris ne nur la ebenaj regionoj kun favoraj kondiĉoj, sed ankaŭ la montozaj regionoj kun relative nebonaj kondiĉoj en la antaŭurboj de Pekino; kaj riĉan rikolton ricevis ne nur tritiko, sed ankaŭ hordeo, pizo kaj aliaj frue maturiĝantaj plantaĵoj. Pekinaj distriktoj kaj gubernioj Fengtaj, Hajdian, Pinggu, Tonghian, Fangŝan k. a. ricevis grandskalan pliprodukton de tritiko. La komunumoj kaj brigadoj ĝenerale ricevis pliprodukton de 4-5 dekonoj

kompore kun la lasta jaro kaj nemalmultaj el ili ricevis produktkvanton superantan la rekordon en la historio. Tio estas rezultato atingita de la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj revoluciaj kadroj de la antaŭurboj de la ĉefurbo, kiuj energie kondukis batalon inter la du klasoj kaj inter la du linioj, elstarigis la proletaran politikon kaj persistis komandi produkton per revolucio, sub la forta helpo de la PLA-anoj subtenantaj agrokulturon, kaj estas ankaŭ eksterordinare granda frukto de la aktiva subteno fare de la ĉefurba laborista klaso al la agrikulturo en la antaŭurboj.

LA KVARA ABUNDRIKOLTA JARO DE HENAN

Henan-provinco estas unu el la ĉefaj tritikaj regionoj de nia lando kaj ĉijare ĝi ricevis abundan tritikan rikolton surbaze de la riĉaj rikoltoj en la pasintaj tri sinsekvaj jaroj. Kvankam iuj lokoj de Henan suferis de naturaj katastrofoj kiaj pluva inundo, sablovento, plantmalsanoj kaj finsektaj en la pasintaj vintro kaj printempo, sed la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj revoluciaj kadroj unuanime kaj solidare kondukis obstinan batalon kontraŭ la katastrofoj kun la revolucia heroisma spirito “fari firman decidon, timi nenian oferon kaj superi ĉiujn malfacilojn por akiri venkon” kaj finfine akiris riĉan tritikan rikolton.



Ĉengguan-komunumo de Ŝanhian-gubernio, Ŝandong-provinco, ree akiris riĉan rikolton de tritiko.

ŜANDONG AKIRIS RIĈAN RIKOLTON DE TRITIKO EN AREO DE PLI OL KVINDEK MILIONOJ DA MUOJ

Ŝandong akiris riĉan rikolton de tritiko en areo de pli ol kvindek milionoj da muoj. La vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj diris, ke tio estas alia granda venko de Maŭzedongpenso. De la pasinta vintro, lernante la revolucian spiriton de Daĝaj sinapogi sur la propraj fortoj kaj peneme luktadi, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de multaj regionoj faris akvoutiligajn konstruojn malgraŭ frosto kaj neĝblovado kaj tiel plivastigis irigaciatan areon. En la printempo, kiam la tritiko reverdiĝis, venke inaŭguriĝis la Naŭa Kongreso de la Partio. Kuraĝigate de la Naŭa Kongreso, la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj fariĝis ankoraŭ pli plenaj de alta batalspirito. Ili energie

plifortigis la prizorgon de la plantaĵoj kun senprecedenca entuziasmo, pliiĝis aldonajn sterkojn, plivastigis la areon de irigaciaj kampoj kaj finfine akiris la abundan tritikan rikolton en la kuranta jaro.

BONEGA SITUACIO DE LA AGRIKULTURO EN ŜENHI

Bonega situacio aperis sur la agrikultura fronto de Ŝenhi-provinco, kaj la pli ol tridek milionoj da muoj da tritiko kaj aliaj somere maturiĝantaj plantaĵoj atingis riĉan rikolton. Tio estas nova riĉa rikolto de tritiko post la pluraj aliaj sinsekve akiritaj de tiu provinco. La pliprodukto estas relative grandampleksa. La urbo Hi-an kaj multaj subprovincoj ricevis pliprodukton de 10 ĝis 30 procentoj kompare kun la pasinta jaro, kaj la produktkvanto de nemalmultaj distriktoj superis la plej altan en la historio.

HEBEJ AKIRIS MALOFTAN RIĈAN RIKOLTON DE TRITIKO

Hebej-provinco, unu el la ĉefaj tritikaj regionoj de nia lando, akiris riĉan rikolton de tritiko kiel en la ebenaj kaj montozaj regionoj tiel en la malaltaj facile inundablaj kaj salalkalaj regionoj. Kaj eĉ iuj salalkalaj regionoj, kiuj kutime havis malabundan rikolton, akiris abundan rikolton de tritiko maloftan en la historio. Kaj en multaj partoj de la provinco aperis nemalmultaj grandareaj altproduktaj kampoj. Multaj maljunaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris ĝoje: “Havante tiel grandan aĝon, mi tamen ankoraŭ neniam vidis tiel bonan tritikon. Tio ja estas venko de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ ‘**teni la revo-**

Kadroj kaj komunumanoj de la Ĉina-Albana Amikeca Komunumo kune resumas ĉijaran sperton de riĉa rikolto de tritiko sur draŝejo.



lucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito’ ”.

SOMERE MATURIĜANTAJ GRENPLANTOJ EN LA ANTAŬURBOJ DE TIANGIN RICEVIS ABUNDAN RIKOLTON

En la kuranta jaro, la antaŭurboj de Tiangin denove akiris abundan rikolton de tritiko kaj printempa hordeo en kvarcent okdek mil muoj da tero. La totala kaj pomua produktkvantoj de tritiko de la okcidenta kaj norda antaŭurboj kaj Bejdagang-distrikto superis la rekordajn en la historio. Ankaŭ la produktkvanto de printempa hordeo en rizkampoj ricevis relative grandamplaksan altiĝon.

LA TRITIKA PRODUKTKVANTO DE ŜANHI SUPERIS LA REKORDON EN LA HISTORIO

Dum la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ŝanhi-provinco persistas en ĉiutaga studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, starigis la revolucian penson de terkulturado por la revolucio kaj disvolvis la amasan movadon “**lerni de Daĝaj en agrikulturo**”. Kun la revolucia spirito de sentimo al penado kaj morto, ili obstine batalis kontraŭ naturaj katastrofoj, energie faris malgrandajn akvoutiligajn konstruojn kaj plifortigis sian surkampa zorgadon pri la tritiko kaj finfine akiris riĉan rikolton de tritiko sur areo de dekkvin milionoj da muoj de la provinco. La produktkvanto de tritiko de multaj komunumoj kaj brigadoj de la provinco altiĝis je pli ol 30 procentoj kompare kun tiu de la pasinta jaro. La produktkvanto de tritiko de la tuta provinco superis la plej altan nivelon en la historio.

Nia Ŝtato Estas Senŝulda

Ŝtato en la Mondo

EN la antaŭvespero de la Liberiĝo de nia tuta lando, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ akraŭvide antaŭdiris: “Ni bone kapablas ne nur detrui malnovan mondon, sed ankaŭ konstrui novan mondon. La ĉina popolo povos ne nur vivi sen almozpeti de la imperiistoj, sed eĉ vivi pli bone ol la imperiismaj landoj.” Hodiaŭ, tiu granda antaŭdiro jam fariĝis realo. Ĝuste kiel la “Decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Proletara Kultura Revolucio” montris, ke “La Granda Proletara Kultura Revolucio estas potenca movforto por disvolvi la sociajn produktajn fortojn en nia lando”, nia agrikultura produkto akiris riĉajn rikoltojn en la lastaj sinsekvaj jaroj, kaj aperas plena vicleco ankaŭ en industria produkto kaj en scienco kaj tekniko. La aktiveco de la vasta laboranta popolo en revolucio kaj produktado senprecedence leviĝas, kaj multaj industria kaj minaj entreprenoj senĉese renovigas siajn produktajn rekordojn kreante la plej altajn produktajn nivelojn en sia historio. La teknika revolucio nun senhalte disvolviĝas. Regas prospero en la merkato, kaj la prezoj de komercaĵoj restas stabilaj. Multe pli altiĝas la nivelo de la materia kaj kultura vivo de la popolo ol en la pasinteco. En la fino de 1968, nia lando liberiĝis de ĉiuj ŝtataj obligacioj. Sekve Ĉinio fariĝis socialisma lando, kiu ŝuldas nek enlande nek eksterlande.

Tio estas ĝojiga kaj entuziasmiga afero en la politika kaj ekonomia vivo de nia lando. Tio estas granda venko akirita de centoj da milionoj da ĉinaj popoloj, kiuj persistas ĉe la granda principo de Prezidanto Maŭ pri **sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**, strebas al potenco kaj pene luktas kontraŭ malfaciloj.

I

Antaŭ dek naŭ jaroj, kiam la nova Ĉinio naskiĝis, la kuomintanga reakciularo postlasis al ni la aĉan situacion, en kiu detruiĝis la produktado, mizere vivis la popolo, regis inflacio kaj alten flugis la prezoj. Por fari socialisman konstruadon sur tia bazo ni alfrontis multajn malfacilojn. Tiam la imperiismaj reakciuloj asertis, ke “la financaj kaj ekonomiaj malfaciloj de Ĉinio estas nevenkeblaj”. Sed la ĉina popolo armita per Maŭzedongpenso komplete bankrotigis la reakciajn aŭguristojn de imperiismo per siaj brilaj sukcesoj en konstruado dum la pasintaj dek naŭ jaroj.

Sur kiuj fortoj ni devis apogi nin por fari socialisman konstruadon, kiam ni troviĝis sub la malfavoraj kondiĉoj de tre subevoluintaj ekonomio kaj kulturo? Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ saĝe elmetis la principon de **sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**, t.e., la ĉina popolo devas apogi sin sur la propraj fortoj, lukti malgraŭ ĉiuj malfaciloj kaj konstrui sian landon diligente kaj ŝpareme.

Laŭ la konstanta instruo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ la kapitaloj por socialisma konstruado en nia lando venas ĉefe el la interna akumulado de la socialisma ekonomio. La enspezoj devenantaj de ŝtataj entreprenoj okupas pli ol naŭdek procentojn de la financaj enspezoj de la ŝtato. En la procedo de konstruado per niaj propraj fortoj, por mobilize utiligi la kapitalojn de la vastaj popolamasoj, provizore neuzatajn, kaj en pligrandigo de la socialisma reprodukto, nia lando emisiis enlandajn obligaciojn en certa periodo. De 1950 ĝis 1958 nia lando sesfoje emisiis obligaciojn kun totala sumo de 3,840,000,000 *yuan*,

plus interezoj pagendaj en sumo de 980,000,000 *juan*. La totala sumo repagenda, inkluzive la kapitalojn kaj interezojn, estis 4,820,000,000 *juan*. La totalo estis jam plene amortizita en la fino de la pasinta jaro. En la komenca periodo post la fondiĝo de nia popola respubliko, precipe en la periodo de la kampanjo por kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion, Sovetunio, kiu estis tiutempe sub la gvido de Stalin, helpis nin per pruntedono, kaj la sumo de la kapitalo kaj interezo estis 1,406,000,000 novaj rubloj. Tiun eksterlandan ŝuldon ni ĉiam persistis repagi laŭ fiksitaj tempoj, kaj ĝi estis komplete repagita antaŭtempe en la komenco de 1965.

Nia ŝtato jam fariĝis senŝulda ŝtato en la mondo. Tiu granda atingo montras, ke la socialisma ekonomia forto de nia lando plipotenciĝas kun ĉiu tago, kaj nia socialisma financo fariĝis pli solida.

Sub la brilo de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso okazis terrenversa ŝanĝo en la fizionomio de nia tuta nacia ekonomio post malfacila lukto de niaj diversnaciaj revoluciaj popoloj dum dek naŭ jaroj. Kompare kun la komenca periodo post la fondiĝo de nia respubliko, la produkta kvanto de grenoj, kotono, ole-donaj kaj aliaj plantoj kaj la nombro de porkoj, ŝafoj kaj aliaj brutoj jam duobligiĝis aŭ kelk-obligiĝis. La totala produkta valoro de la industrio de nia lando dekkelkoble kreskis. Ni ankaŭ starigis novajn industriajn branĉojn, kiaj la aeroplana, aŭtomobila, traktora, elektrona, petrola, kemia, ktp., tiel ke en nia lando unuapaŝe formiĝis moderna industria sistemo memstara kaj relative kompleta en branĉoj. La sciencesplora laboro kaj eduka kaj higiena aferoj en nia lando ankaŭ ricevis grandan disvolviĝon. Post sukcesa eksplodigo de la unua atombombo en 1964, nia lando sukcesis eksplodigi novan hidrogenan bombon en la pasinta jaro. Samtempe kun la rapida disvolvigo de nia nacia ekonomio, laŭ la spirito de proletara internaciismo kaj nia ebleco ni aktive subtenas la revoluciajn batalojn de la revoluciaj popoloj de la mondo, subtenas kelkajn nove sendependiĝintajn landojn en Azio kaj Afriko en ilia ekonomia disvolvigo, kaj helpas ilin efektivigi la principon de sinapogo sur propraj fortoj.

II

Nun troviĝas en la mondo du specoj de ŝuldoj radikale malsamaj en naturo. Unu el ili estas la ŝuldo de kapitalismaj kaj reviziismaj landoj. Ĝi servas al la ekspluata klaso aŭ la privilegia

tavolo el malmultaj homoj, kaj ĝi estas ekspluata rimedo por prirabi la laborantan popolon de la koncerna lando kaj koloniajn popolojn. La alia estas la ŝuldo de la socialisma lando. Ĝi servas al proletaro kaj la vasta laboranta popolo, kaj ĝi estas helpa rimedo, kiu servas al la afero de socialismo. La naturon de la du malsamaj specoj de ŝuldoj decidas la du radikale malsamaj soci-sistemoj. La obligacioj emisiitaj de nia lando kaj la prunto, kiun nia lando prenis de Sovetunio en la pasinteco, havas la jenajn trajtojn:

Unue, la emisiitaj obligacioj kaj la eksterlanda pruntepreno de nia lando estis uzitaj por socialismaj produktado kaj konstruado, kaj ili celis la bonon de la vasta laboranta popolo. Ni prenu la obligaciojn kiel ekzemplon. La tuta sumo ricevita el la obligacioj estis uzita por disvolvi nian nacian ekonomion. Tio estas plene konforma al la fundamenta intereso de la vasta popolo, kaj tial la popolo ne sentis, ke la aĉetado de obligacioj estas ŝarĝo por ĝi, kaj aktive aĉetis ilin opiniante, ke tio estas subteno al la konstruado de la propra lando kaj sekve ankaŭ ĝia devo.

Due, kaj la enlandaj obligacioj kaj la eksterlanda pruntepreno estis nur rigardataj kiel helpaj rimedoj por certaj periodoj. Ilia kvanto estis rigore kontrolata kaj tute limigita. En la periodo de restarigo de nia nacia ekonomio kaj en la periodo de nia batalo kontraŭ Usono kaj helpo al Koreio, nia lando renkontis provizorajn ekonomiajn malfacilojn. Eĉ sub tiaj kondiĉoj ni klopodis per ĉiuj rimedoj utiligi niajn internajn latentajn fortojn, apogante nin sur la propraj fortoj, kaj ne metis nian esperon sur prunteprenoj. Tiam nia registaro emisiis nur limigitajn kvantojn da obligacioj kaj prunteprenis nur malgandan sumon de eksterlando. Kun la disvolviĝo kaj plifortiĝo de la nacia financa kaj ekonomia bazo, nia lando baldaŭ ĉesis emisii obligaciojn kaj pruntepreni de eksterlando kaj rapide repagis ĉiujn ŝuldojn en- kaj eksterlandajn.

Trie, ni ĉiam persistis pri la principo de ĝustatempa repago. Nia lando neniam prokrastis la repagon de en-kaj eksterlandaj ŝuldoj ĝis post la limtempo, kaj ĝenerale ni eĉ faris nian repagon antaŭtempe. Nia lando trafis seriozajn naturajn katastrofojn en tri sinsekvaj jaroj de 1959 ĝis 1961. En tiu tempo la sovetunia reviziisma renegata kliko perfide ĉesigis subite sian ekonomian kaj teknikan helpon al nia lando, revokis siajn specialistojn kaj kaŭzis tre grandan damaĝon al nia ekonomio. Eĉ en tia malfacila situacio nia lando ankoraŭ repagis ĝustatempe nian ŝuldon sen prokrasto de eĉ unu

tago. Laŭ la kontrakto, la limtempo por repago de la ŝuldo al Sovetunio estis decembro de 1965, sed nia lando pli frue ĝin repagis kaj fariĝis kvita jam en la komenco de tiu jaro.

Kompare kun la ŝuldoj de socialismaj landoj, la ŝuldoj de landoj sub la regado de imperiismo, social-imperiismo kaj reakciularo diferenciĝas per la jenaj tri trajtoj:

Unue, la ŝuldoj en la laste menciitaj landoj estas karakterizataj per rabemo kaj reakcieco. En landoj sub la regado de imperiismo, reviziismo kaj reakciularo, milito estas grava kaŭzo de la estiĝo kaj kresko de la ŝtataj ŝuldoj. La emisio de obligacioj kaj la pruntepreno el eksterlando estas unu el la ĉefaj rimedoj por kovri militajn elspezojn. Tiuj landoj grandkvante uzas la kapitalojn ricevitajn per prunteprenoj por fari militajn mendojn kaj produkti armilojn kaj municion. El tio rezultas, ke la monopola burĝaro akiras grandegan profiton kaj la malmultaj privilegiuloj multe riĉiĝas, sed la vasta laboranta popolo portas sur si ŝarĝon ĉiam pli pezan. Ekzemple, en Usono, post ĉiu milito la meznombra ŝarĝo de ŝtata ŝuldo por ĉiu laborulo ĉiam abrupte kreskas. Kiel fakton ni citu nur la obligaciojn emisiitajn de la usona registaro. En 1913, en la antaŭvespero de la Unua Mondmilito, ĉiu usona laborulo meznombro prirespondis 14 usonajn dolarojn. Dum la periodo de la Unua Mondmilito, la sumo kreskis ĝis 80 usonaj dolaroj. Dum la periodo de la Dua Mondmilito ĝi pliiĝis ĝis pli ol 1,300 usonaj dolaroj. En la nuna agresmilito kontraŭ Vjetnamio ĝi jam plue kreskis ĝis pli ol 2,000 usonaj dolaroj.

Due, vivado el prunteprenoj faras la ŝuldon ĉiam pli kaj pli granda. Kiel ekzemplon ni prenu la usonan imperiismon, kiu estas nomata la plej riĉa lando en la kapitalisma mondo. La sumo de ĝiaj ŝuldoj estas terure granda. Laŭ informo publikigita de Usono mem, ĝis la fino de julio 1968, la totalo de obligacioj repagendaj de tiu lando jam atingis la grandan sumon de 351,700,000,000 usonaj dolaroj, kiu superis duoblon de la totala financa enspezo de Usono en 1968. La eksterlanda ŝuldo de Usono atingis la sumon de 33,100,000,000 usonaj dolaroj en la fino de majo, 1968. En Sovetunio, sub la regado de la reviziisma renegata kliko, laŭ la materialo publikigita de ĝi mem, sole la prunteprenoj faritaj de la Banko por Eksterlanda Komerco el kapitalismaj landoj atingis la sumon de 1,000,000,000 rubloj dum la daŭro de tri jaroj de 1964 ĝis 1966. La hinda reakcia registaro, kiu troviĝas sub la ŝirmo de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo, jam antaŭlonge dronis

en tian staton, ke ĝi tenas sian vivon ĉefe per prunteprenoj. Laŭ informo de hinda ĵurnalo en la pasinta jaro, la repagendaj ŝtataj ŝuldoj de la hinda registaro atingis la sumon pli ol trioble aŭ kvaroble superantan ĝian totalan financon enspezon de la tuta jaro.

Trie, la repago estas longe prokrastata kun malalta kredito. La landoj sub la regado de imperiismo, reviziismo kaj reakciularo grandkvante uzas la kapitalojn prunteprenitajn por celoj neproduktaj, kaj tial ili ne povas, nek intencas repagi siajn ŝuldojn laŭ fiksita limtempo. Sekve la repago estas longe prokrastata, kaj ilia kredito estas tre malalta. Rezulte de tio, ke la obligacioj repagendaj jam atingis tre grandan sumon kaj la novaj obligacioj emisiitaj ĉiujare ne sufiĉas por kovri la pagendajn interezojn de la malnovaj obligacioj, Usono prokrastas la repagon de siaj ŝuldoj jaro post jaro, ne volante kvitigi sin. Sovetunio sub la regado de la reviziisma renegata kliko havas grandan sumon da malnovaj ŝuldoj, kiujn ĝi ne kapablas repagi, kaj tial ĝi prokrastis la repagon de la kapitaloj de la obligacioj emisiitaj antaŭ 1958 ĝis post 20-25 jaroj. Tio estas alia formo de nepago de ŝuldoj.

La akra kontrasto supre dirita vivece spegulas la senkomparan superecon de la socialisma sistemo de nia lando kaj la potencon vivforton de la nova Ĉinio sub la brilo de Maŭzedongpenso. Ni returnu nian rigardon al la landoj sub la regado de la usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj iliaj lakeoj. La plejparto de ili sidas en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj, kaj sub iliaj bilancoj amase aperas ruĝaj ciferoj. Ili alfrontas politikan kaj ekonomian krizojn ĉiam pli seriozajn. Ilia mono devalutiĝas kaj la prezoj alte leviĝas. Ili implikiĝis en malfaciloj enlande kaj eksterlande kaj trovas neniun elirejon, proksimiĝante al la tago de kompleta ruiniĝo. Politike kaj ekonomie ili freneze subpremas kaj ekspluatas la laborantan popolon kaj vekas ĉe la vastaj popolamasoj ĉiam pli fortajn malkontenton kaj kontraŭstaron. Kaj fine ili estos enterigitaj de la fajrego de popola revolucio.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris antaŭlonge: **“La malamiko putriĝas tagon post tago, dum la afero por ni pliboniĝas kun ĉiu tago.”** Tio estas objektiva leĝo de historio sendependa de homa volo. Hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la ĉina popolo sub la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ nun energie klopodas efektiviĝi la diversajn batalajn taskojn difinitajn de la Naŭa Kongreso de la Partio por konstrui Ĉinion en pli potencon socialisman landon.

“Nekuracebla Malsano”

Jam Venkita

— Kuracaj laborantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo sukcese kuracis sekvaĵon de poliomjelito

FAREnda ESTAS ĈIO KION LA POPOLO BEZONAS

En aŭgusto de 1968, dank’ al la granda Maŭzedongpenso la 208-a Hospitalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo sukcese resanigis la revolucian popolanon Ĝang Gujĝi, kiu paralizigis kvar jarojn kaj kies malsanon burĝaj reakciaj teknikaj aŭtoritatoj juĝis kiel “nekuraceblan”. Sekve de la disvastiĝo de tiu ĝojiga novaĵo, paralizaj malsanuloj alvenis de diversaj lokoj esperplene por ricevi kuracon. Post ekzamenado oni konstatis, ke plejparto de la helpopetantoj paralizuloj suferas de sekvaĵo de poliomjelito.

De longa tempo, sekvaĵo de poliomjelito estis rigardata kiel “nekuracebla malsano”. Ankaŭ la dirita hospitalo ne havis sperton pri kuraco de tiu malsano. Ĉu oni forpuŝu la helpopetantajn klasfratojn ekster la pordon aŭ venki la “malfacilaĵon” por la bono de la popolo? Severa provo prezentigis antaŭ ili.

“Firme stari kun la ĉina popolo kaj tutkore, plenanime servi al la ĉina popolo estas la sola celo de tiu ĉi armeo.” Pensante pri la instruo de Prezidanto Maŭ kaj vidante la pacientojn surlite kuŝan-

taj, Ĉen Mengju, estro de la fiziko-terapia fako, longe ne povis trankviligi sian koron. La voĉo de la malsana ruĝgardiano Pang Ji sonadis ĉe lia orelo:

“...En la tagoj por revolucia amasa intervizito, mi venis al la granda ĉefurbo Pekino kune kun miaj samlerneĵanoj, kun kora fideleco al Prezidanto Maŭ kaj firma decido por lin defendi sindone. Estis karaj PLA-anoj, kiuj min portis surdorse paŝon post paŝo al Tian-anmen-placo, tiel ke mi povis propraokule vidi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, kiun mi sopiradis tage kaj nokte. Nun miaj samlerneĵanoj marŝis al la fronto de agrokultura produktado, respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ pri iro al montregionoj kaj kamparo. Sed la abomeninda malsano malebligis, ke mi plenumu la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ kune kun la samlerneĵanoj. Kiel mi deziregas, ke mi estu frue resanigita por dediĉi mian forton al socialismo!”

Ĉen Mengju ekvidis, ke ankaŭ la sinteno al la malsanoj de la vastaj revoluciaj amasoj koncernas la batalon inter la du linioj. La burĝara kuraca kaj higiena linio antaŭenpuŝita de la granda re-



Kuracaj laborantoj de ĈPLA zorge kuracas malsanan knabon.



Amaso da resaniĝintaj infanoj post kuracado

negato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj ignoris la interesojn de la vastaj popolamasoj kaj ne prenis la oftajn kaj ordinarajn malsanojn kiel la gravitan punkton en la kuraca laboro. Sed ni estas popola armeo kaj fidela plenumanto de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj la bezono de la popolo estas la gvida principo por nia agado. Do li laŭtlegis al la kuracaj laborantoj unun post alia la leterojn alsenditajn de la pacientoj, vekis ilian proletaran sentimenton kaj pliiĝis ilian konsciencen en plenumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. La senrenomaj kuracistoj, flegistoj kaj laboratoriaj laborantoj kun ruĝa koro senlime fidela al Prezidanto Maŭ firme decidis batali por la intereso de la vastaj popolamasoj kaj venki la “malfacilegajon” en la monda medicina historio — sekvaĵon de poliomjelito.

UNUE FARI PROVOJN SUR SIA KORPO

De kie oni komencu? Ili studis instruon de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ diris: “De kie venas la korektaj ideoj de la homo? Ĉu ili

falas de la ĉielo? Ne. Ĉu ili estas propraj al la cerbo? Ne. La korektaj ideoj de la homo nur povas veni de socia praktiko, de la produkta batalo, klasbatalo kaj scienca eksperimentado — la tri tipoj de praktiko en la socio.” El la instruo de Prezidanto Maŭ ili komprenis, ke la nun konataj akupunkturaj punktoj estas trovitaj de antaŭuloj per klinika praktikado en sennombraj kazoj kaj tiu praktikado ja ne ĉesis. Ni devas “fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn”. Por malpliigi la doloron de la klasfratoj, la kuracaj laborantoj decidis eltrovi novajn akupunkturajn punktojn por kuraci sekvaĵon de poliomjelito per provado sur sia propra korpo.

En profunda nokto, kompartiano-flegisto Gin Mingĝi komencis pikadi per pinglo fojon post fojo sur sia korpo. Kiam li ekfaris profundan enpikon en sian lumbon, li ektimetis, sed tiam li ekpensis pri la klasfratoj atendantaj kuracadon kaj la instruo de Prezidanto Maŭ tuj eksonis ĉe liaj oreloj: “Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.” Lia koro ardiĝis

kaj li persiste enpikis firme tenante la arĝentan pinglon kaj kunpremante la dentojn. Por trovi novajn akupunkturajn punktojn, iuj kamaradoj tiel fervore provpikadis, ke iliaj femuroj ŝveliĝis kaj iliaj okuloj ruĝiĝis pro maldormo, kaj tamen tiuj kuracaj laborantoj armitaj per Maŭzedongpenso sentis ĝojon kaj feliĉon en tio. Ili diris: “Per nia pli multa sufero, ni povos akiri feliĉon por pli multaj homoj. Por defendi la kuracan kaj higienan linion de Prezidanto Maŭ, ni volonte oferus nian vivon.” Ili elmetis por si la devizon: “Neniam fari enpikon sur la korpo de klasfrato sen certeco; prefere mem riski nian vivon ol igi klasfratojn suferi doloron.”

Ĉiutage, reveninte hejmen post sia deĵorado, fakestro Ĉen Mengju prove pikis siajn gambojn en diversaj manieroj per pingloj de diversaj dikecoj kaj longecoj. Tiel li faradis pikojn preskaŭ ĉie sur la gamboj en kelkaj sinsekvaj tagoj. Kiam li enpikis certan punkton per dika injekta pinglo spite al doloro, kaj ekpikis iom forte, li sentis, kvazaŭ la femuro estus elektro-fragita kaj ekŝvitis tutkorpe; kiam li kirle movis la pinglopinton ĉirkaŭ la punkto, li trovis ke longe daŭras la sentoj de aciddoloro, elektrofrapo, streĉiĝo kaj peziĝo. Li ege ĝojiĝis kaj diris sian novan eltrovon al siaj kamaradoj. Li forgesis la doloron de pikado kaj denove komencis provadi kune kun la aliaj.

Kaj tiamaniere ili per ripetaj provoj kreis la progresintan sperton de kuracado de sekvaĵo de

poliomjelito per “terapio de incitado je akupunktura punkto”.

EKSKLUZIVE KAJ SENREZERVE POR LA POPOLO

Klinika praktikado pruvis, ke la kuracefiko per la “terapio de incitado je akupunktura punkto” estas okulfrapa. La kuracaj laborantoj tamen ne kontentiĝis je tio, kaj ili ĉiam kontrolis sian laboron per la mezuriloj “ekskluzive” kaj “senrezerve”.

Ma Lihua, filino de malriĉkampano, suferis de sekvaĵo de poliomjelito kaj ŝiaj ambaŭ gamboj paralizigis. Post zorga kuracado kaj flegado, ŝiaj kruroj iom post iom varmiĝis, dikiĝis kaj fortiĝis, sed ankoraŭ estis tre malfacile por ŝi stariĝi. Kiel helpi ŝin liberiĝi de tiu malfeliĉo? Kun tiu demando, flegisto Sun Ming studis vorton post vorto la jenan instruon de Prezidanto Maŭ: “Ĉe studo de kiu ajn procezo, se tiu estas komplika, enhavanta pli ol du kontraŭdirojn, ni devas fari nian plejblon por trovi la ĉefan kontraŭdiron. Kiam tiu ĉi estas kaptita, ĉiuj problemoj povas esti facile solvitaj.” Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, li zorge analizis kaj studis la kazon de Ma Lihua kaj resumis la sukcesan kaj malsukcesan spertojn en la antaŭa kuracperiodo. Li pensis, ke kiam oni faras paŝojn, la kruroj estas movataj per la femuroj kaj la etendo kaj retiro de la kruroj dum paŝado estas farataj per la glutea granda muskolo (*musculus gluteus maximus*) kaj la femura kvarkapa muskolo (*musculus quadriceps*)



La malsupraj membroj de Ĝaŭ Tiehua, kiu suferis de sekvaĵo de poliomjelito dum dek jaroj, paralizigis kaj terure deformiĝis. Post kuracado la deformiĝo estas fundamente korektita kaj ŝi povas nun rekte stari. La dekstra foto estis farita antaŭ la kuracado kaj la maldekstra post la kuracado.



Heroaj Limgardaj Batalantoj

— Vizito al iu limgarda stacio de PLA en la areo de Ĝenbaŭ-insulo

ĈE la piedo de Vanda-monto kaj la bordo de Vusuli-rivero firme staras heroa limgarda stacio armita per Maŭzedongpenso.

Tie estas kontraŭreviziisma antaŭposteno de nia granda socialisma patrolando. Fronte al armitaj provokoj de la sovetunia reviziisma renegata kliko, disvolvante la revolucion spiriton timi nek penadon nek morton sub la brilo de Maŭzedongpenso la heroaj limgardaj batalantoj akiris venkojn unu post la alia en bataloj de sindefenda rebato, brave defendis la sanktan teritorion de la partolando kaj faris novajn meritojn por la popolo.

Tie estas ankaŭ granda lernoĉambro de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Garnizonante en la limregiono, la vastaj amasoj de kadroj kaj batalantoj havas koron inklinan al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ili persistas en viva studo kaj viva apliko de la granda doktrino de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj konscie hardas sian ruĝan koron senlime fidelan al la granda gvidanto Prezi-

danto Maŭ ĉe la kontraŭreviziisma antaŭposteno, montrante sian noblan revolucionan kvaliton esti ĉiam pretaj sin oferi heroe por defendi la patrolandon kaj Maŭzedongpenson.

En la garnizonejo de la limgarda stacio ĉie regas la revolucia atmosfero komandi ĉion per Maŭzedongpenso. La heroaj limgardaj batalantoj skribis la brilantajn vortojn “Verkoj de Prezidanto Maŭ ellernigis al mi servi al la popolo” sur la muro de sia loĝejo, kiu frontas kontraŭ Vusuli-rivero. En frontaj gardejoj, sur tabuloj estas skribitaj multaj eldiroj de Prezidanto Maŭ, kiaj: **“La teritorion kaj suverenecon de Ĉinio devas nepre defendi la ĉina popolo, kaj estas absolute ne tolerate, ke fremdlanda registaro ilin atencu”**. **“Se neniu atakos nin, ni atakos neniu; se iu atakos nin, ni certe kontraŭatakos lin.”** Tiel dum tagnokta patrolado, kiel en la bataloj por rebati la armitajn provokojn de la sovetunia reviziismo, la batalantoj ĉie kaj ĉiam agas ankoraŭ pli serioze laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ. Kaj sub la nutrado de la sunbrilo kaj roso de Maŭzedongpenso ili timas

femoris). Ma Lihua ne povis stari kaj iri ĉefe pro tio, ke tiuj du muskoloj velkiĝis, malfortiĝis kaj perdis sian povon. Tio estis la ĉefa kontraŭdiro. Nur per solvo de tiu kontraŭdiro, oni povas solvi la problemon de irado. Tial li aplikis novan kuracmetodon, kaj finfine Ma Lihua akiris ir-kapablon.

Garantianta la plenumon de la regula kuraca tasko de la trupo, la kuracaj laborantoj de la 208-a Hospitalo prenis sur sin la pezan taskon de kuracado de pacientoj de sekvaĵo de poliomjelito. Por ke la pacientoj ricevu ĝustatempan helpon, la kuracaj laborantoj laboras ĉiutage ĝis profunda nokto. Ili diris: “La malsanulaj ĉambroj ja

estas batalfronto por defendi la kuracan kaj higienan linion de Prezidanto Maŭ, kaj resanigi unu plian klasfraton ja signifas fari plian kontribuon en defendo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.”

Nur en kvin monatoj ilia zorgema kuracado ebligis al miloj da pacientoj, kiuj suferis paralizon kelkajn aŭ dekelkajn jarojn, denove stari kaj aliĝi al la vicoj de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Tio ĉi estas venko de Maŭzedongpenso, venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj alia giganta frukto de la Granda Proletara Kultura Revolucio.



Niaj limgardaj batalantoj, kiuj firme gardas sian postenon en la areo de Ĝenbaŭ-insulo, klopodas vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson, plifortigas la ideologian revoluciigon kaj juras oferi ĉion sian por defendi la sanktan teritorion de la patrolando.

nek penadon nek morton kaj venke antaŭenmarŝas kun plena vigleco. Ilia heroa ĵuro estas:

Maŭzedongpenson brilan faras ni l'animo,

Sur kontraŭreviziisma batalejo ni hardas nian ruĝan koron.

Al Prezidanto Maŭ fidelas ni senlime,

Por batali kontraŭ reviziism' ĝisfine ni havas ŝtalan volon.

La limgarda stacio troviĝas en profundejo de arbaro ĉe la bordo de Vusuli-rivero. Somere, moskitoj ĝenas; vintre, la frosta vento muĝas kaj ĉie estas kovrita de neĝo kaj glacio. Sed, plenaj de revolucia optimisma spirito, la heroj limgardaj batalantoj rigardas suferojn kaj penadojn kiel gloron kaj ĝojon kaj prenas sian garnizonejon kiel plej bonan lernoĉambron por kulturi homojn per la penso servi al la popolo. Venis tien aro post aro novaj batalantoj. La unua afero por ili estas studi la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*, por starigi la penson domaĝi

nenion sian por la venko de la komunisma afero kaj fari la firman decidon konduki la batalon kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciularo ĝis la fino por defendi la grandan socialisman patrolandon! Iufoje, patrola taĉmento ekiris por plenumi sian taskon en rigora malvarmejo de pli ol 30 gradoj sub la nulo. La mondenvolva neĝstormo tre malfaciligis ilian antaŭeniradon. La komandanto kaj batalantoj alterne recitis la vortojn de Prezidanto Maŭ: **“Faru firman decidon, timu nenian oferon, superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**. Kiam ili malsatis, ili ekpensis pri la ruĝaj armeanoj, kiuj transgrimpis neĝmonton kaj trapasis marĉan herbejon; kiam ili sentis sin malvarmaj, ili ekpensis la heroon Luo Ŝenggiaŭ de la Ĉinaj Volontuloj, kiu savis infanon el glaciiginta rivero, en la tempo de rezisto kontraŭ la usona imperiismo por helpi Koreion; kiam ili soifis, ili ekpensis pri la batalantoj, kiuj ne havis akvon en tunelo dum la batalo de Ŝangganling; kiam dormemo atakis ilin, ili ekpensis la herojajn batalantojn, kiuj rebatis la hindajn entrudiĝintojn ĉe la landlimo inter

Ĉinio kaj Hindio. Tion pensante ili brave antaŭenmarŝis kontraŭ vento kaj neĝo. Ili diris: Penado estas gloro, kaj persisteco signifas venkon. En patrolado por defendi la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj la sanktan teritorion de nia patrolando, ni volonte spertos ankoraŭ pli grandan penadon kaj laciĝon.

Alifoje, la limgarda batalanto Meng Hianĝong iris kun siaj tri kunbatalantoj al iu insulo por plenumi taskon. Sur la vojo la neĝtavolo estis dika je 3-4 futoj, temperaturo falis ĝis pli ol 40 gradoj sub la nulo, kaj ĉiu antaŭenpaŝo postulis grandan penadon. Sed Meng Hianĝong kaj liaj kunbatalantoj havis nur unu decidon: firme kaj senŝanceliĝe antaŭenmarŝu por defendi la socialisman patrolandon. Dum irado ili studis vortojn de Prezidanto Maŭ kaj per liaj instruoj direktis sin brave marŝi antaŭen. Ili kuraĝigis sin per la spirito de ĝisfunda revolucio de ruĝaj armeanoj, kiuj en sia tempo batalis sude kaj norde sekvante Prezidanton Maŭ. Kiam ili soifis, ili englutis bulon da neĝo; kaj kiam ili malsatis, ili mordis kunportatan mantoon. Kaj tiamaniere ili luktis, kun vigla batalvolo, 21 sinsekvajn horojn kaj fine plenumis

venke la taskon. En jubilo de venko la batalantoj alte tenis la ruĝe brilantan *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj emocie diris: Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Fideli al vi signifas venkon! Kaj sub la direktado de via brila penso, ni kontraŭreviziismaj batalantoj povas superveni ĉian ajn malfacilon kaj danĝeron, neniam devojiĝi dum mil-lia patrolado kaj venke marŝi antaŭen ĉiam laŭ via proletara revolucia linio!

Neĝo kaj frosto ne povis haltigi antaŭenmarŝadon de la heroaj limgardaj batalantoj, kaj furiozaj ventoj kaj ondoj hardis ilin ankoraŭ pli fortaj. Iutage, la estro de la tria subplotono Ji Ĉenghua gvidis 5 batalantojn patroli sur malgranda boato al la malsupra fluejo de Vusuli-rivero. Sur la revena vojo subite leviĝis ventego de 7-a klaso. La furioza vento levis grandajn ondojn, kaj la malgranda boato forte ŝanceliĝis. Sed la limgardaj batalantoj armitaj per Maŭzedongpenso timas nenian malfacilon. Ili diris: La vento estas granda, sed ne tiom kiom estas la decidemo de limgardaj batalantoj armitaj per Maŭzedongpenso, kaj la ondoj estas altaj, sed ne tiom kiom estas la batalvolo de limgardaj batalantoj fidelaj al Prezidanto Maŭ. Laŭte kan-

Kun forta indigno, la armeanoj kaj popoloj en la areo de Ĝenbaŭ-insulo kondamnas la ĝisĉielajn krimojn de la armitaj fortoj de la sovetunia reviziismo, kiuj invadis nian sanktan teritorion.



tante la kanton *Ruĝan Armeon Ne Timigas Longa Militir'* kaj recitante vortojn de Prezidanto Maŭ, ili faris lukton kontraŭ la furiozaj vento kaj ondoj kaj remis antaŭen metron post metro. Post intensa batalo de pli ol 6 horoj ili fine revenis venke al la limgarda stacio.

La heroaj limgardaj batalantoj ĉiam armas sian kapon per Maŭzedongpenso kaj tagnokte dediĉas ĉiujn siajn fortojn por defendi la grandan socialisman patrolandon. Fronte al frenezaj provokoj de la novaj caroj de la sovetunia reviziismo, la heroaj limgardaj batalantoj ĉiuj montris revolucionan heroisman spiriton de sentimeco kaj sinoferemo. En la 2-a kaj 15-a de marto la sovetunia reviziisma renegata kliko direktis siajn limgardajn armeanojn freneze invadi nian teritorion Ĝenbaŭ-insulon kaj la unuaj pafi per fusiloj kaj kanonoj kontraŭ ni. En situacio ne plu tolerebla, niaj heroaj limgardaj batalantoj devigite faris bravan sindefendan rebaton, donis al la invadantoj meritatan punon kaj venke defendis la sanktan teritorion de la patrolando.

Post kiam la juna batalanto kaj komunisto Hju Linguj venis al tiu ĉi limgarda stacio, li tuj studis la "tri popularajn artikolojn" frazon post frazo kaj aplikis ĉion studitan por akceli sian revoluciigon

sub la helpo de la malnovaj batalantoj. En ordinara tempo, li ne timis penadojn kaj laboris aktive kaj solide; dum batalado li ne timis vivoferon kaj luktis brave kaj obstine. En la 2-a de marto, la sovetunia reviziisma renegata kliko senskrupule ekspedis armitajn trupojn en granda nombro por entrudiĝi en nian Ĝenbaŭ-insulon kaj fari militajn provokojn. Kun alta indigna flamo, Hju Linguj decideme faris sindefendan rebaton kune kun siaj kunbatalantoj kaj donis pezan baton al la sovetuniaj reviziismaj invadantoj. Lia ŝtala ĵuro estis: "Preferere morti pro unu paŝo antaŭen en batalo por defendi la sanktan teritorion de la patrolando, ol vivi per duonpaŝa retiriĝo!"

Sub la kuraĝigo de la spirito de la Naŭa Kongreso de la Partio, la heroaj limgardaj batalantoj nun levis novan altan tajdon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Ili decidis fari la limgardan stacion granda ruĝa lernejo de Maŭzedongpenso kaj daŭre disvolvi la proletaran revolucionan spiriton timi nek penadon nek morton kaj estas pretaj doni ankoraŭ pli pezan baton al sovetuniaj reviziismaj agresantoj, kiuj kuraĝas invadi nian landon, por akiri ankoraŭ pli grandan venkon en la granda batalo kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciularo.

Kun vigla gardemo, niaj heroaj limgardaj batalantoj patrolas laŭ Hejlong-rivero kaj ĉiam estas pretaj doni frakasan rebaton al agresantoj.



Liberigitaj Fiŝistoj Strikte Sekvas Prezidanton Maŭ

La Fiŝkapta Brigado de Tieĉang-komunumo, Boluo-gubernio, Guangdong-provinco, estas antaŭiranta kolektivo en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. La liberigitaj fiŝistoj en tiu brigado diris tre prave: “Putriĝas akvo, se ĝi longe stagnas; fendiĝas ŝipo, se ĝin oni ne riparas; kaj pro nestudo de Maŭzedongpenso, en reviziismon oni falas.” Avide ili studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj tuj aplikas, kion ili ellernas. Antaŭe ili okupiĝis nur pri fiŝkaptado en rivero. Post la Liberiĝo, sub la direktado de la brila Maŭzedongpenso, ili konstruis, per siaj kolektivaj fortoj, novan vilaĝon de fiŝistoj kaj komencis fiksloĝadi. Post kiam Prezidanto Maŭ elmetis la alvokon “lerni de Daĝaj en agrokulturo”, ili pene luktadis sin apogante sur la propraj fortoj, fosis laĝetojn por bredi fiŝojn krom la fiŝkaptado en rivero, aktive kulturis rizon, bredis porkojn kaj kreskigis legomojn por krei senĉese pli multajn riĉaĵojn por socialismo, grandpaŝe marŝante sur la socialisma ŝoseo kun levitaj kapoj.

Fiŝkaptado





Stepo en Prospero

Sur la paŝtejo de la popola komunumo Ruĝa Stelo de Hinjuan-gubernio de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono abundas ŝafaroj kaj ĉevalaroj kaj ĉie regas prospero. Kun senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la paŝtistoj diligente vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, kaj sin apogante sur la fortoj de la kolektiva ekonomio de la popola komunumo ili racie utiligis kaj transformis la stepon kaj starigis brutkuracejojn kaj staciojn de artefarita generado, tiel ke ilia brutbredado ricevis grandan disvolviĝon.

Dekstre: Zorgema bredado

Sube: Grasa ŝafaro



Paštistoj aŭskultas la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ.




Ĉevalaro



Gardstarantoj sur la Montaro Himalaja

— Pri la herooj agoj de limgarda batalantoj de
la Liberiga Armeo sur la Tibeta Altebenejo

*Nia heroo limgarda batalanto gardostaras sur landlima
linio alta je 4800 metroj super la marnivelo.*



Ĉiam kiam la ruĝa radio alportas plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ al landlima altebenejo, limgardaj batalantoj tuj komunikas ilin en plej alta rapideco al paŝtistoj, kiuj troviĝas en foraj anguloj sur la altebenejo.



LA limgardaj batalantoj en Tibeto armitaj per la ĉiamvenka Maŭzedongpenso tagnokte patrolas sur la monda tegmento—Himalaja. Tenante la patrolandon en la koro kaj ĵetante la rigardon al la mondo, kun la ĝisfunda revolucia spirito timi nek penadon nek morton, ili gardstaras por defendi la patrolandon.

LA HEROOJ VENKIS LA “FLAMANTAN MONTON”

Malgranda limgarda taĉmento de iu trupo de la Tibeta Milita Regiono alvenis iun lokon de la altebenejo por plenumi patrolan taskon. Tie la montoj estas altaj kaj ankaŭ la temperaturo

estas alta, kaj nenia herbo kreskas sur la montoj, kiuj similas al la Flamanta Monto en mito.

La komandantoj kaj batalantoj ĉi tien alvenis jam tri tagnoktojn. La kunportita akvo estis delonge fortrinkita, sed ili ankoraŭ ne sukcesis trovi fonton. Plie, eĉ pluvero ne falis. Soifo turmentis la gorĝon de la komandantoj kaj batalantoj. Akvomanko portis al ili grandan malfacilon en plenumo de la tasko.

Sed la komandantoj kaj batalantoj ne estis timigitaj de la serioza malfacilo. Ili sin organizis kaj kune studis la instruon de Prezidanto Maŭ: “**En tempo de malfacileco, ni devas vidi niajn atingaĵojn,**

devas vidi la lumon kaj devas levi nian kuraĝon.” Tio fortigis ilian kuraĝon por venki akvomankon. Ili diris: “Ju pli mankas al ni akvo, des pli devas esti ĉe ni Maŭzedongpenso; havante la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson ni povas venki ĉian ajn malfacilon.” Sinapogante sur la kolektivaj saĝo kaj forto ili finfine trovis akvoellasantan lokon sub iu roko, sed la fonto estis tro malabunda, kaj en du horoj oni povis ricevi nur malgrandan tason da ŝlima akvo. La batalantoj sendis la unuan tason da akvo al taĉmentestro Ĉen Degong, kiu suferis de stomaka malsano. Tenante la tason da akvo plena de profunda klasa amo, Ĉen Degong tre emociiĝis. Li trinkis neniun guton kaj transdonis ĝin al aliaj batalantoj. Tiu malgranda taso da akvo estis transdonita de unu al alia tra la tuta taĉmento, sed neniuj volis ĝin trinki.

Sub la serioza akvomanko, la komandantoj kaj batalantoj faris firman decidemon, multimis vivoferon kaj finfine plenumis venke la gloran taskon asignitan de la Partio.

NE ESTAS MALFACILO NEVENKEBLA

Iu montpinto de Himalaja altas pli ol 5,800 metrojn super la marnivelo kaj pikas kvazaŭ akra spado rekte en nubon. Sur ĝi groteskaj ŝtonoj ĉie staras kiel arboj, kaj krutas vertikalaj rokoj.

Iutage de septembro, taĉmento de iu limgarda trupo venis ĉi tien por gardi nian grandan socialisman patrolandon. Renkonte al ostpike frosta vento ili komencis grimpi la monton altan je pli ol 5,800 metroj. La prujno sur ŝtonoj estis glitiga, tial la piedoj ne povis stari stabile. Krome, la aero maldensiĝis kaj mankis oksigeno. Ili malfacile spiradis kaj devis fari tre grandan penon por ĉiu paŝo antaŭen. Antaŭ la malfacilo ili disvolvis sian revolucionan spiriton timi nek penadon nek morton. Ili diris, ke la batalantoj armitaj per Maŭzedongpenso venkos ĉian ajn malfacilon. La monto estas

alta, sed ne tiom kiom ilia revolucia batalvolo; la malfacilo estas granda, sed ne tiom kiom ilia decidemo por venki la malfacilon. Dum grimpado de la monto la batalantoj voĉlegis la vortojn de Prezidanto Maŭ “**faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**”. Plotonestro Li Zajhing ne povis akomodiĝi al la klimato de alta monto, sed li ne estis timigita de la malfacilo kaj la unua surgrimpis la montpinton. Li diris: “Kiam ni posedas Maŭzedongpenson, antaŭ ni ne estas malfacilo nevenkebla.”

Atinginte la montpinton, la batalantoj rezignis ripozon kaj singardeme postenis en furioza

Sur longa landlima linio, la armeo kaj popolo unuiĝas kiel unu homo. Komunano-paŝtisto raportas al la limgardaj komandantoj kaj batalantoj la staton de landlimo, kiun li konstatis.



vento, kaj tiel faris novan meriton por defendi la patrolandon.

AGLOJ EN ŜTORMO

Iu landlima pozicio en Tibeto situas ĉe iu monto de Himalaja alte je pli ol 4,300 metroj super la marnivelo kaj tie la klimato estas kaprica. En vintro glacio kaj neĝo dika je 2-3 metroj kovras la monton, kaj sur krutaj rokoj pendas vicoj da glaciaj kolonoj; en somero jen vuĝas densa nebulo, jen hajlas subite, jen pluvegas kaj jen uraganas. Dank' al la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, la limgardaj batalantoj tie garnizonantaj tagnocte gardas sur la neĝmonto.

En iu uragana nokto, neĝo plenigis la tranĉeojn kaj kovris la gardejon. Batalanto Li Ginming forigis neĝon kaj starante sur la tegmento de la gardejo observis kun vigla gardemo spite al neĝblovo... Iom poste, neĝo denove kovris la gardejon

kaj telegrafajn stangojn, sed li venkis malfacilojn unu post alia, kaj finfine plenumis sukcese la taskon.

Iun tagon en somera fino tondro kaj pluvo furiozis. Por defendi la grandan socialisman patrolandon, la komandantoj kaj batalantoj de la landlima taĉmento gardstaris en tranĉeoj malgraŭ forta pluvo. Kvankam la vestoj estis malsekigitaj kaj la piedoj staris en akvo profunda je duona futo, tamen neniu forlasis sian batalpostenon. Vespere malvarmega vento ekblovis, kaj la tramalsekigitaj vestoj ekhavis maldikan tavolon da glacio, kio frostigis la batalantojn ĝis tremiĝo. Ili laŭte legis la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Tiu ĉi armeo posedas spiriton nevenkeble marŝi antaŭen, kaj ĝi decidas faligi ĉiujn malamikojn kaj neniam esti subigita de malamikoj.”** Ili obstine persistis stari sur sia posteno. Prenante sian suferadon kiel gloron kaj ĝojon, ili klopodas hardi sian ruĝan koron senlime fidelan al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la malfacilaj kondiĉoj kaj tiel akiris novan venkon.

KURANTAJ AFEROJ

TRUNKLINIA ELEKTRA LOKOMOTIVO KUN GRANDKAPACITA DUONKONDU- KILA REKTIFILO

Dank' al forta subteno kaj kunlaboro de frataj unuoj, la revoluciaj laboristoj de la Tianhin-a Lokomotiva Fabriko de Ĝuĝou, Hunan-provinco sukcese provfabrikis nian unuan trunklinian elektran lokomotivon de Ŝaŭŝan-tipo kun grandkapacita duonkondukila rektifilo de progresinta nivelo.

En la pasinteco, oni aplikis fuz-tuban rektifilon por transformi alternan kurenton en kontinuan kurenton por elektraj lokomotivoj. Por la nove provfabrikita elektra loko-

motivo por ŝarĝ- kaj pasaĝer-transportado, oni aplikis silician duonkondukilan rektifilon de progresinta strukturo, kies partoj ĉiuj estas fabrikitaj de nia lando. Kompare kun la elektraj lokomotivoj kun fuz-tuba rektifilo, la novtipa veturas pli sekure, estas pli oportuna por uzado kaj protektado, pli malpeza kaj malgranda, la bezonata prepara tempo por ekfunkciigo estas pli mallonga kaj pli malgranda estas la produktokosto kaj kosto por protektado. Tia nova elektra lokomotivo taŭgas precipe por veturado sur longa kaj akuta deklivo kaj konformas al la efektivaj bezonoj de la fervoja transportado de nia lando.

Timi Nek Penadon

Nek Morton

— Pri heroaĵo de malriĉkamparanino Vang Genfeng

SONG JING

LA Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando malfermis novan epokon, en kiu la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj rekte posedas Maŭzedongpenson.

Dank' al nutrado de la ĉiamvenka Maŭzedongpenseno, rapide kreskas miloj kaj miloj da revoluciaj herooj.

En la alta tajdo de la amasa movado de energia studo, propagando kaj efektivigo de la brilaj dokumentoj de la Naŭa Kongreso de la Partio, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ŝaduntoŭ-brigado de Ligiaĝuang-komunumo, Giande-gubernio karmemoras kun profunda amo la heroan batalantinon-malriĉkamparaninon kamaradino Vang Genfeng, kiu timis nek penadon nek morton.

“NE ZORGU MIN, TUJ SAVU ILIN!”

La 18-an de septembro, 1968, la batalo de riverbarado por kampo-konstruo fare de Ŝaduntoŭ-brigado proksimiĝis al sia fino.

Frumatene de tiu tago, la malriĉkamparanino Vang Genfeng sentis sin iom laca. Malriĉkamparanino onklino Maŭ Ginhua diris al ŝi zorgeme: “Vi tro laĉiĝis jam, Genfeng, do ripozu unu tagon!”

“Ne,” diris Genfeng. “Ni ĵus kunvenis antaŭ kelkaj tagoj kaj volas iri la vojon montritan de Prezidanto Maŭ **“lerni de Daĝaj en agrokulturo”** por ŝanĝi la postĝintecan fizionomion de nia loko, kiel do mi povus ripozi trankvile!”

Kaj renkonte al la matena suno, Genfeng denove iris al laboro kune kun aliaj komunumanoj. Irante

survoje, ŝi recitadis la instruon de Prezidanto Maŭ: “Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.” Atinginte la konstruejon, ŝi tuj komencis vektportadi per du paroj da korboj, paŝante flugrapide.

Dum laborado en la posttagmezo, kiam Vang Genfeng iris al la loko, kie ripozis komunumanoj, por preni laborilojn kaj komenci porti teron, subite aŭdiĝis tondra bruego — kolosa maso de teriĝantaj ŝtonoj falis desupre. Videble la sube ripozantaj komunumanoj estis en vivdanĝero. En tiu kriza momento, laŭte kriante “tuj forkuru”, Vang Genfeng sin ĵetis tien per paŝego por eltiri la 13-jaran Caŭ Genhua. Sed jam malfrue, kaj dekoj da kubmetroj da teriĝantaj ŝtonoj falis kaj kovris Vang Genfeng kaj aliajn kelkajn komunumanojn.

La komunumanoj ĉe la loko ĉiuj rapidis en la polvajn nubojn por savi siajn klasajn gefratojn.

Malriĉkamparano Deng Ĉangŝeng la unua alkuris kaj vidis, ke Vang Genfeng staras kovrite de teriĝantaj ŝtonoj ĝis la talio. Li kuris al ŝi por ŝin savi, sed Vang Genfeng fingre montris suben kaj diris firme: “Ne zorgu min, ankoraŭ estas aliaj sube, tuj savu ilin!”

Membro de la revolucia gvida grupo de la brigado Vang Ĝugaŭ alrapidis kaj vidis, ke Vang Genfeng spiras rapide. Li tuj apogis ŝin per sia brako kaj diris, ke oni tuj elfosu ŝin. Sed Vang Genfeng denove diris firmvole: “Ne zorgu min, tuj elsavu la sube kovritajn!”

“Ne zorgu min, . . .” estas heroaj vortoj brilantaj per Maŭzedongpenso, elŝprucintaj el la profundo de la animo de kamarado Li Venĝong, bona batalanto de Prezidanto Maŭ, en la lasta momento de lia vivo, kiam li luktis kontraŭ rivera torento por savi ruĝgvardianojn. Tiuj vortoj koncentre manifestas la komunisman noblan kvaliton de proletara heroo. Vang Ĝugaŭ diris emocie: “Ne, ni klopodos elsavi ĉiujn klasajn gefratojn!”

Dume, ĉiuj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĉe tiu loko jam alrapidis kaj ankaŭ la laboristoj de Janggiankoŭ-akvokonservejo alrapidis. Centoj da paroj da manoj haste fosadis; iliaj ungoj difektiĝis kaj iliaj fingroj ŝirvundiĝis, sed neniu zorgis pri tio.

Sin apogante sur la korpo de Vang Ĝugaŭ, Vang Genfeng demandis de tempo al tempo: “Ĉu la enpremitaj estas elfositaj?”

Pasis unu minuto, du minutoj. . . , elsaviĝis malriĉkamparano Ŝeng Dongjing, elsaviĝis malriĉkamparano-junulo Hju Juĉeng, elsaviĝis ankaŭ komunumanino Ŝaŭ Caj-e!

Pasis ankoraŭ tri minutoj, kvar minutoj, kaj finfine oni zorgeme formovis per dudenta fosilo la teriĝantan ŝtonpecon kun pezo de pli ol mil ĝinoj de sur la gambo de Vang Genfeng, forprenis per manoj la teron de sur ŝia korpo kaj savis el sub ŝiaj gamboj la malriĉkamparanan knabinon Caŭ Genhua. Nur tiam oni trovis, ke la dekstra gambo de Vang Genfeng jam rompiĝis. Kaj ĝuste per tiu gambo Vang Genfeng baris la falintan teriĝantan ŝtonon kaj sekurigis la malriĉkamparanan knabinon Caŭ Genhua.

Kuŝante sur la provizora brankardo, Vang Genfeng ankoraŭ demandadis senĉese en letargio: “Ĉu la enpremitaj estas elsavitaj?” “Ĉu la enpremitaj estas elsavitaj?”

Vang Ĝugaŭ diris ĉe ŝia orelo: “Trankviliĝu, Genfeng, ĉiuj estas jam elsavitaj.”

Aŭdinte, ke ĉiuj aliaj jam elsaviĝis, Vang Genfeng pene malfermis siajn okulojn kaj, rigardante la brilan portreton de Prezidanto Maŭ ĉe la laborejo, diris malfacile sed firme: “Mi. . . jam ne povas vivi! Vi faru ĉion. . . por la kolektivo. Ne . . .ne haltu. . . en ‘lerno de Daĝaj en agrokulturo’!” Malrapide ŝi levis siajn ambaŭ manojn kaj per sia tuta forto elkriis, vorton post vorto, la plej fortan voĉon de nia epoko:

“Vivu Prezidanto Maŭ!”

Jaŭ Mejlan kaj Li Juhiang ŝin prizorgantaj apude kriis forte skuante ŝian sultron: “Genfeng! Genfeng! . . .”

La virinoj kaptis la manojn de la alrapidinta kuracisto kaj diris: “Kamarado kuracisto! Kamarado! prenu de ni karnon kaj haŭton kaj elĉerpu sangon de ni, se necese, sed nepre savu la vivon de Genfeng!” Alsvarmiĝis ĉiuj aliaj kaj petis: “Kaj haŭton kaj sangon ni donos laŭbezzone, sed nepre savu la vivon de Genfeng!” Tamen la

30-jara Genfeng glore oferis sian junan vivon por defendi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj sekurigi la vivon de siaj klasaj fratinoj!

Kiom da homoj dolore malĝojegis pro la perdo de tia komunisma batalantino timanta nek penadon nek morton. Tenante la manon de Genfeng, la 82-jara maljuna malriĉkampano Li Ĉenkang verŝadis larmojn sur sian sulkoplenan vizaĝon kaj murmuradis senĉese: "Genfeng ja ne mortis! Genfeng ja ne povas morti!"

Kun varmaj larmoj en la okuloj, oni trovis ĉe Genfeng nur jenajn postlasaĵojn: ekzemplero de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj ekzemplero de "tri popularaj artikoloj". Tiuj trezoraj ruĝaj libroj estas la vojmontra lampo por la brila vivo de Vang Genfeng.

La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Ŝaduntoŭ-brigado, la laboristoj de Janggiakoŭ-akvokonservejo kaj la respondeculoj de la distrikta kaj komunuma revoluciaj komitatoj, kiuj alrapidis informiĝinte pri la incidento, ĉiuj staris antaŭ la korpo de Vang Genfeng, mallevis la kapojn kun dolora malĝojo kaj diris ĵure: "Genfeng, vi mortis por la interesoj de la popolo, kaj via morto estas pli peza ol la monto Tajŝan. Ni nepre daŭrigos vian nefinitan aferon kaj ĉiam iros laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!"

FIRME IRI LAŬ LA VOJO MONTRITA DE PREZIDANTO MAŬ

Vang Genfeng vivis por batali por la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj mortis por la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

En la printempo de 1955, la vastaj kampanaj amasoj en la hejmloko de Vang Genfeng ĝenerale aliĝis al agrokulturaj kooperativoj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke "la socialisma vojo estas la unika vojo por la agrokulturo de nia lando", kaj senprecedence altiĝis ilia socialisma aktiveco. Sed la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj kunuloj kriaĉis en eĥo kun la klasaj malamikoj en la socio por "pogrande forhaki kooperativojn", vane provante bari la socialisman revolucian torentegon en la kampano. Aŭdinte, ke iuj deziras forhaki kooperativojn, la 17-jara Vang Genfeng tiel indigniĝis, ke ŝiaj pulmoj preskaŭ kreviĝis!

"Niaj kampoj estis donitaj de Prezidanto Maŭ, kaj la kooperiga vojo estas montrita de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ diris, ke ni organiziĝu por

komuna riĉiĝo. La vortojn de Prezidanto Maŭ ni nepre aŭskultos, kaj la kooperativon ni nepre funkciigos plue!"

Tion diris Vang Genfeng ĉie, ĉu en sia hejmo aŭ en la domoj de aliaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, ĉu dum kolektiva laborado aŭ en domoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de najbaraj vilaĝoj, kiujn ŝi preterpasis dum kolektado de brulligno.

Kaj Vang Genfeng speciale vizitis Je Ginŝun, la vicedron de la kooperativo al kiu membriĝis ŝia fianĉo Vu Ŝiming, kaj petis ke li transdiru tion al Ŝiming.

La historia tajdo estas nebarebla, kaj "la reakcia kontraŭfluo neniam povos fariĝi la ĉefa fluo". Tiujare, sub la brila direkto de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la indignaj ondegaj de la socialisma revolucio en la kampano disfalis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de la plenmano da diabloj kaj demonoj. La kooperativo, kies membro Vang Genfeng estis, senĉese firmiĝis, disvolviĝis kaj fortiĝis en batalado.

La klasaj malamikoj indigne grincigis siajn dentojn pro la venko de la socialisma revolucio en la kampano kaj ili klopodis trovi ŝancon por fari detruojn kaj renverson en ĉiu horo. Kaj en la tri jaroj de portempaj malfaciloj en la nacia ekonomio de nia lando, la ĉina Ĥruŝĉov Liu Ŝaŭki levis nigran venton de kapitalisma restaŭro en la kampano, forhakigis energie arbarojn en la montoj kaj kulturigis privatajn parcelojn, en strikta kunagado kun la kontraŭĉinia ĥoro de imperiismo, reviziismo kaj la reakciularoj.

Vizaĝe al la nova provo, Vang Genfeng diris firme: "Kial ni retroiru, se Prezidanto Maŭ diris, ke ni firmigu la kolektivian ekonomion, disvolu arbarojn sur la montoj kaj marŝu antaŭen? En tio ĉi certe iuj celas fari subfosadon. Ili ne servas al ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, sed por la bienuloj kaj kulakoj! Tio ĉi estas ne ŝoseo, sed vojeto, vojo al senelirejo!"

Al ĉiu kiun ŝi renkontis, Vang Genfeng propagandis la instruon de Prezidanto Maŭ pri firmigo de la kolektiva ekonomio kaj firme iris la vojon montritan de Prezidanto Maŭ, kune kun la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Ŝi gvidis kaj unuigis la klasajn gefratojn, kiuj firme iris la socialisman vojon, kaj donis solidan baton al la intrigo de Liu Ŝaŭki por restaŭri kapitalismon.

La Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ sonigis funebran sonorilon por Liu Ŝaŭki kaj ĉiuj diabloj kaj demonoj. Alte tenante la revolucionan standardon **“pravas ribelo kontraŭ la reakciularo”**, Vang Genfeng lanĉis, kune kun la aliaj revoluciaj ribeluloj, furiozan ĝeneralan ofensivon kontraŭ la ideologio de la ekspluataj klasoj kaj ĉiuj klasaj malamikoj, brave batalis en la plejfronto por defendi la revolucionan linion de Prezidanto Maŭ kaj senĉese faris novajn kontribuojn por la popolo.

“MI NEPRE GRAVUROS LA ‘TRI POPULARAJN ARTIKOLOJN’ EN MIAN CERBON KAJ ILIN APLIKOS EN MIA PRAKTIKADO”

Vicprezidanto Lin instrukiis: “La ‘tri popularaj artikoloj’ estas plej facile legeblaj, sed estas ne tiel facile ilin apliki en praktiko. Studu la tri popularajn artikolojn kiel maksimumojn. ... apliku ĉion kion vi lernis por bone plenumi ideologian revoluciigon.” Vang Genfeng profunde komprenis la instrukcion de Vicprezidanto Lin kaj ŝi prenis la “tri popularajn artikolojn” kiel akrajn armilojn por reformi sian mondkoncepton kaj kriterion por siaj kondutoj.

Vang Genfeng diris: “Mi nepre gravuros la ‘tri popularajn artikolojn’ en mian cerbon kaj ilin aplikos en mia praktikado.” Ŝi tiel diris kaj ankaŭ tiel agis.

Vang Genfeng estis membro de la Kvina Brigado, ŝi tamen zorgis pri ĉiuj kolektivaj aferoj de ĉiu ajn unuo. Ĉiufoje, kiam oni urĝe kolektis sekigatan rizon sur la draŝejo, neniam tie ŝi mankis. Por ke la rizo ne malsekiĝu, ŝi ofte rapidis al la sekigejo por urĝa kolektado, eĉ ne surmetinte al si larĝrandan ĉapelon. Kiam aliaj zorgeme bedaŭris malsekiĝon de ŝiaj vestoj, ŝi diris: “Se homo malsekiĝis, li ŝanĝu la vestojn kaj ĉio estos en ordo; tamen se rizo malsekiĝis, estas malfacile ĝin aranĝi.”

Kiam Genfeng iris sur monton kune kun kelkaj virinoj de la Sesa Brigado, por kolekti herbojn por porkbredado, kaj preteriris rizkampojn de la Sesa Brigado, ŝi rimarkis ke la kampoj sekiĝis. Ŝi do haltis kaj malfermis la kanaletojn por irigacii ilin. Tio tre kortuŝis la virinojn de la Sesa Brigado, kaj ĉi tiuj diris: “Sekiĝis la kampoj de nia Sesa Brigado, tamen pri ili zorgas Vang Genfeng de la Kvina Brigado. De nun ni nepre ne lasu, ke Genfeng maltrankviliĝu pro la irigaciado de nia brigado.” Depost tio, ili, kiel Vang Genfeng, ĉiam zorgas ne nur pri la iri-

gaciado de sia brigado, sed ankaŭ zorgas pri aferoj de aliaj brigadoj.

Vang Genfeng malamas la klasajn malamikojn kaj amas siajn klasajn gefratojn. Ŝi **“zorgas pri la aliaj pli multe ol pri si mem”**. Jang Ŝoufu kaj lia frato havas neniun en sia domo por zorgi pri ilia vivo, Vang Genfeng do faris ŝuojn por ili kaj sendis al ili. Ŝoufu volis pagi por la ŝuoj, sed Genfeng diris: “Se mi volus vian monon, mi ne farus tion por vi.”

La edzino de la najbaro Deng Ŝujhaj mal-sanadis dumlonge, kaj Genfeng helpadis lin en lavado de vestoj, dekoktado de drogoj kaj zorgado de lia infano, monaton post monato kaj jaron post jaro. Deng Ŝujhaj kortuŝiĝis ĝis larmoj, sed Vang Genfeng diris: “Ni estas gefratoj de la sama klaso kaj devas **‘zorgi, ame protekti kaj helpi unu alian’**.”

Hia Ĉungiaŭ, avino de “kvin garantioj”, estis maljuna kaj malforta, kaj Genfeng konstante flegadis ŝin dum pluraj jaroj. Vintre, ŝi alsendis fornon al la avino por varmigi ŝian domon kaj somere ŝi lavis por ŝi la korpon. En la ordinaraĵoj, ŝi liveris al ŝi akvon kaj manĝaĵon, kaj ofte faris bongustajn pladojn ŝatatajn de la avino. Ŝi prizorgis la avinon pli bone ol vera filino, ke la avino tiel kortuŝiĝis, ke ŝi ne povis trovi taŭgajn vortojn por ŝin danki. Sed Genfeng diris: “Ĉio ĉi tio estas pro la bona gvidado de Prezidanto Maŭ. Se ne estus Prezidanto Maŭ, mi Genfeng ankoraŭ vivaĉus kiel ŝarĝbruto. Se vi volas danki, vi danku nian amatan Prezidanton Maŭ.”

Ĉiuj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Ŝaduntoŭ-brigado diris: “Genfeng estas kora amanto de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj ŝi estas vivanta Ĝang Side.”

Vang Genfeng oferis sian vivon. Sed la heroa figuro de Vang Genfeng ĉiam brilados antaŭ niaj okuloj kaj ŝia nobla kvalito por ĉiam engravuriĝos en nia koro.

La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hiaduntoŭ-brigado firme decidis agi kiel Vang Genfeng kaj ĉiam estos senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ, senlime fidelaj al Maŭzedongpenso kaj senlime fidelaj al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, prenante Vicprezidanton Lin kiel sian brilan ekzemplon, kaj daŭre kondukos revolucion sub la proletara diktaturo, timante nek penadon nek morton.

Ruĝa Propagandistino

Angîrhan

EN ujugura vilaĝo en suda Hingiang vivas ujugura virino nomata Angîrhan, kiu estas pli ol 40-jara. Kunportante ruĝan trezoran libron, ŝi ofte rajdante azenon vizitas aliajn vilaĝojn kaj brigadojn por propagandi la grandan Maŭzedong-enson, kaj estas nomata “ruĝa propagandistino de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj”. Lastatempe, ŝi entuziasme propagandas diversajn batalajn alvokojn elmetitajn de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio al la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Angîrhan estas membro de la Deko Brigado de Hajjang-komunumo de Vuŝi-gubernio. Kaj ŝi naskiĝis en familio de malriĉa kamparano. Ŝiaj du fratoj estis mortigitaj de bienulo per turmentado kaj ŝi devis fariĝi servistino de bienulo, kiam ŝi estis nur 14-jara. En la jaro 1949, liberiĝis Hingiang, Prezidanto Maŭ savis ŝin el la abismo de suferoj, kaj ŝi komencis ĝui feliĉan vivon. Ekde tiam tiu ĉi filino de malriĉkamparano multe suferinta kaj sange subpremita jam ĵuris sekvadi la grandan savanton Prezidanto Maŭ. De la agrara reformo ĝis la popolkomunumigo, Angîrhan ĉiam estas aktivulino. Kaj ŝi estas kompetentulo en produkta laboro.

Kiam Angîrhan sinforgese laboregis plene energie, ŝi falis malsana. La malsano paralizigis ŝiajn gambojn. El la kvar membroj de ŝia familio, ŝia edzo perdis laborkapablon pro terura torturo fare de bienulo, kiam li servis al la lasta kiel jardungito, kaj ŝiaj du filoj ankoraŭ ne plenkreskiĝis, do ŝi fariĝis “persono de kvin garantioj”.

Angîrhan pasigis dolore ses jarojn pro malsano sur lito. En 1966, la potenca orienta vento de la Granda Proletara Kultura Revolucio portis Maŭzedong-enson en la teran kabanon de Angîrhan. Kiam ŝi unuafoje aŭskultis laŭtleĝon de la brilaj verkoj *Servu al la Popolo, Memore al Norman Bethune* k.a., ŝi sentis kvazaŭ la vortoj de Prezidanto Maŭ estus diritaj al ŝi mem, kaj ju pli ŝi aŭskultis, des pli ŝi emociiĝis. **“Homo povas havi grandan aŭ malgrandan kapablon, sed sole kun tiu spirito, li jam estas homo nobla”**. La instruo de Prezidanto Maŭ, la noblaj figuroj de Ĝang Side kaj Bethune lumigis ŝian koron kvazaŭ torĉoj kaj pliigis ŝian kuraĝon por venki la malsanon. Ŝi pensis, ke se kamarado Ĝang Side povis morti por la popolo, kial do ŝi ne povas ion fari por la popolo. Ŝi decidis partopreni kolektivitan fizikan laboron kune kun aliaj komunumanoj.

En la aŭtuno de tiu jaro, spite al sia kripliĝo je la du gamboj, Angîrhan ordonis siajn filojn helpi ŝin surrajdi azenon por veturi al la brigado por partopreni laborojn fareblajn por ŝi, kiaj gardado de la tritika draŝejo, senŝeligo de maizospikoj, selektado de semoj. En la komenco, kiam ŝi rajdadis, ŝiaj gamboj doloris al ŝi; kaj ŝi sentis doloron en la talio kaj kapturniĝon, se ŝi laboris sidante por iom longa tempo. Sed, kiam ŝi ekpensis la instruon de Prezidanto Maŭ, ŝi tuj havis senfinan energion en la tuta korpo. Multaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj zorgeme konsilis al ŝi: “Niaj manoj ja tute sufiĉas por bone plenumi ĉi tiujn laborojn; viaj gamboj ne bone funkcias, do vi trankvile ripozu hejme por resaniĝo!” Angîr-

Ĥan diris ridetante: “Mi ne kalkulas, kiom mi povas fari; mi volas nur servi al la popolo simile al kamarado Ĝang Side.” La ĉiamvenka Maŭzedongpenso stimulas ŝin partopreni kolektivan laboron. Kaj ŝi sentas ĝojon neesprimeblan precipe pro tio, ke ŝi povas ĉiutage lerni kaj propagandi Maŭzedongpenson kune kun la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj.

La suferplenaj travivaĵoj de Anĝirĥan havigis al ŝi profundan klasan amon al Prezidanto Maŭ. Kaj ŝi vidis, ke oni nepre devas armi sian cerbon per la granda Maŭzedongpenso por fariĝi vera proletara batalanto, kaj nur tiam oni povas konduki revolucion dum la tuta vivo, firme sekvante Prezidanton Maŭ. Avide ŝi lernadis verkojn de Prezidanto Maŭ. Vintre de la pasinta jaro, kiam la brigado aranĝis studrondon de Maŭzedongpenso, oni ne sciigis tion al ŝi, por ke ŝi aliĝu, ĉar estis malvarme kaj ŝi ne povis facile moviĝi. Sed ŝi pensis, ke studado de la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ estas grava afero, kiel mi povus ne aliĝi?” Do ĉiutage ŝi persiste rajdis du liojn sur azeno por partopreni studon kaj hejmenrevenis nur malfrue en la nokto por prepari manĝon. Kaj tiel ŝi faris spite al ventegoj kaj pluvoj.

Anĝirĥan studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj tuj aplikas kion ŝi ellernas; ju pli multe ŝi studas, des pli profundiĝas ŝia amo al Prezidanto Maŭ, kaj des pli fortiĝas ŝia malamo kontraŭ la krimago de Liu Ŝaŭki kaj liaj kunuloj en malhelpado al la devastigo de Maŭzedongpenso. Ŝi ofte diras al komunumanoj: “Maŭzedongpenso estas la vivradiko de ni malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. La granda renegato Liu Ŝaŭki vane klopodis blokadi la voĉon de Prezidanto Maŭ kaj deziris, ke la skurĝo de la bienuloj denove falu sur nin malriĉkamaranojn kaj malsuperajn mezkamaranojn. Tio ĉi estas nur sonĝo, kaj ni neniel kaj neniam permesos ĝian efektivigon.” Ŝi profunde komprenis el sia sperto, ke la instrukciojn de Prezidanto Maŭ oni devas ne nur mem bone studi kaj apliki, sed ankaŭ bone propagandi al la amasoj, por ke Maŭzedongpenso enradikiĝu, disfluu kaj fruktodonu en la amasoj. En laborado kaj la studrondo, eĉ je renkontiĝo kun konatoj survoje, Anĝirĥan ĉiuokaze diras siajn komprenaĵojn en studado, aŭ laŭlegas unu aŭ du lernitajn paragrafojn el la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, aŭ parolas pri la amo de Prezidanto Maŭ al la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. La komunumanoj multe stimuliĝis de ŝiaj paroloj.



Anĝirĥan ne nur propagandas buŝe la instruojn de Prezidanto Maŭ, sed ankaŭ kontrolas sian penson kaj konsciencie reformas sian mondkoncepton, detruante sian egoismon kaj starigante kolektivismon. Ŝi komprenis, ke nur tiel agante en praktiko, ŝi povas pli bone propagandi Maŭzedongpenson. Ŝi konstante klopodas informiĝi pri la vivaj pensoj kaj diversaj malfaciloj de la komunumanoj kaj ilin helpi laŭeble por ilia solvo. Se ŝi informiĝis pri manko de akvo al iu familio, ŝi do sendis sian filon por porti akvon por ĝi. La faruno de la “persono de kvin garantioj” Aimuniŝa elĉerpiĝis, Anĝirĥan do rajdis sur azeno al la muelejo kaj portis farunon en ŝian domon. Tio kortuŝis Aimuniŝa ĝis larmoj. Kiam la komunumanoj esprimis dankon al Anĝirĥan, la lasta diris: “Ne danku min. Vi devas danki Prezidanton Maŭ.” Kaj ĝuste en tiamaniero, Anĝirĥan ĉiam kaj ĉie ne forgesas disporti la instruojn de Prezidanto Maŭ al la komunumanoj, por ke ili antaŭenmarŝu senĉese en la sunlumo de la brila penso de Prezidanto Maŭ.

La antaŭirantaj aktivadoj de Anĝirĥan en viva studo kaj viva aplikado de Maŭzedongpenso ricevis laŭdojn ĝenerale en la tuta komunumo, kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de aliaj brigadoj unuj post aliaj invitis ŝin al si, ke ŝi prezentu sian sperton. Por viziti aliajn brigadojn, el kiuj la malproksimaj distancas je 20-30 lioj kaj la proksimaj je 5-6 lioj, ŝi devis rajdadi, kun paralizaj gamboj, sur sia azeno. Iuj kamaradoj de la brigado timis, ke tio estas tro peniga tasko por ŝi. Sed ŝi diris ridante: “Propagandi la brilan penson de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ estas la plej granda gloro kaj plej granda feliĉo en mia vivo, kaj mi povas venki kiom ajn grandajn malfacilojn.”

Foje, Anĝirĥan rajdis sur azeno al la Dua Brigado por propagando. Subite ekpluvis kiam ŝi estis survoje, la azeno glitfalas kaj ŝi falas de sur ĝia dorso. La kadrino, kiu akompanis ŝin, haste helpis ŝin stariĝi kaj diris kun bedaŭro: “Franjo Anĝirĥan, vi iras por propagandi al ni Maŭzedongpenson, sed mi ne bone zorgis pri vi. Vere bedaŭrinde!” Spite al la doloro, Anĝirĥan diris kun rido: “Estas nenio. Prezidanto Maŭ instruas al ni: **Kio estas laboro? Laboro estas batalo!** Pro propagando de Maŭzedongpenso por la revolucia mia falo ja signifas nenion.” Kaj tiamaniere ŝi faris propagandon al 36 el la pli ol 50 brigadoj de la tuta komunumo sole en la periodo de post la komenco

de la pasinta jaro, kaj iujn brigadojn ŝi eĉ vizitis 7-8 fojojn.

Anĝirĥan neniam kaj nenie forgesas propagandi al la popolamasoj la instruojn de Prezidanto Maŭ pri klasbatalo. En la printempo de la pasinta jaro, Anĝirĥan selektis kotonsemojn kune kun aliaj kvin komunumanoj. Iu relative grandaĝa el ili ekkantis amkanton kun feŭdisma kaj superstiĉa enhavo cirkulatan en la malnova socio. Tiam Anĝirĥan ekpensis: Jen tia malnovaĵo kondamnitata de la amasoj denove estas aŭdigata. Tio ĉi signifas leviĝon de malnova penso. Se ni lasus tian malnovan penson senbride disvastiĝi, oni falus en kaptilon de la klasaj malamikoj. Sekve do ŝi studis, kune kun la aliaj, la instruon de Prezidanto Maŭ “**nepre ne forgesu la klasbatalon**” kaj inspiris ilin kritiki tian malnovaĵon. Ŝi diris al ili: “En la malnova socio, ĝuste per tiaj malnovaĵoj la bienularo venenis nin malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, por ke ni ne leviĝu kontraŭ ilia subpremo. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ gvidis nin batali por libero kaj ni turniĝis supren kaj ekĝuis feliĉan vivon. Se nun ni ankoraŭ kantas la malnovajn kantojn, ĉu tio ne signifas lasi la malnovan penson nin venenadi denove? La granda kanajlo Liu Ŝaŭki ja estas la ĉefkrimulo, kiu subtenis tiujn malnovaĵojn. Ni nepre ne falu en lian kaptilon. La revoluciaj kantoj esprimas nian senliman amon al nia savanto Prezidanto Maŭ kaj al Maŭzedongpenso. Kiu ilin kantu, se ne ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj?” Ju pli profunde ili kritikis, des pli fortan malamon ili sentis kontraŭ la malnova socio. Ili unuanime esprimis sian volon multe kanti revoluciajn kantojn por esprimi sian senliman fidelecon al Prezidanto Maŭ. Anĝirĥan instruis al aliaj foje kaj refoje la revoluciajn kantojn “Eternan Vivon al Prezidanto Maŭ” kaj kantojn kun tekstoj el vortoj de Prezidanto Maŭ. Ekde tiam, senĉese aŭdiĝas revoluciaj kantoj ĉiutage en la semselekta grupo, kaj la labora entuziasmo de ĝiaj membroj ĉiam pli grandiĝas.

Sub la brilo de la Naŭa Kongreso, Anĝirĥan esprimis entuziasmoplene al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ke ŝi firme decidis ankoraŭ pli bone vive studi kaj vive apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ, agadi dum la tuta vivo kiel propagandanto de Maŭzedongpenso por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj dediĉi ĉiujn siajn fortojn por fari sian komunumon granda ruĝa lernejo de Maŭzedongpenso.

“Mi Ne Revenos al Mia Patrio antaŭ ol Finplenumi la Taskon!”

— Pri la komunisto Ĝaŭ Ĝenŝeng en helpado al fremdlando

LA rakonto pri kortuŝa agado de k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng, elstara komunisto kaj bona laboristo edukita de Prezidanto Maŭ, estas vaste cirkulata kaj neforgeseble impresis la tanzanian popolon.

En aŭgusto de 1966, k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng ricevis la gloran taskon helpi al la konstrua laboro de Tanzanio. Kiam la gvidantaro demandis lin pri eventualaj helpoj bezonataj, kun emocio li esprimis: Mi estas komunisto, kaj helpi la konstruadon de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latin-ameriko estas la internacia devo de ni laborista klaso. Mi absolute ne vanigos la konfidon kaj esperon de Prezidanto Maŭ kaj la popolo de la patrio.

Veninte al Tanzanio, k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng estis asignita al la konstruejo de Ŝpinteksa Fabriko de Amikeco inter Ĉinio kaj Tanzanio por ripari la konstruajn maŝinojn kaj samtempe instrui laboristojn de Tanzanio. Tiutempe, en la tuta konstruejo nur li sola respondecis pri tiu ĉi laboro kaj tie oni laboris en tri deĵoroj sinsekvedum la tuta tagnokto. Do lia tasko estis tre peza. Sed memorante la instruon de Prezidanto Maŭ: “**Kio estas laboro? Laboro estas batalo. En tiuj lokoj estas malfaciloj kaj problemoj, kiuj bezonas esti solvataj de ni. Ni iras tien labori kaj batali por solvi la malfacilojn. Bona kamarado estas tiu, kiu pli deziras iri tien, kie la malfaciloj estas pli grandaj**”, li eksentis sin plena de energio, elpensis multajn metodojn por venki la malfacilojn, kaj garantiis normalan funkciadon de la pli ol 50 grandaj kaj malgrandaj konstruaj maŝinoj. Iatempempe, li vidis, ke la laboroj de instalado kaj levado estas streĉitaj, li aktive helpis ilin dum elpremitaj tempoj kaj faris plej grandajn penojn por rapidigi la konstruadon.

Iun posttagmezon, kiam Ĝaŭ Ĝenŝeng intense laboris sur sia laborposteno, al maŝino manipolata de tanzania laboristo okazis perturbo, kio haltigis laboron de pli ol 30 laboristoj. Tion vidinte, Ĝaŭ Ĝenŝeng tuj alkuris por helpi lin ripari la maŝinon. Malfeliĉe, lia maldekstra brako estis frapita de parto de la maŝino. Tuj ekfluis sango kaj netolerebla doloro lin atakis. Kunpremante la dentojn, li tamen piediris al la oficejo de la konstruejo pli ol 300 metrojn fore de la loko.

Pro limigo de la kuracaj kondiĉoj, la vundo de k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng serioziĝis kaj eĉ minacis lian vivon. La gvidantaro decidis sendi lin al alia loko por kuraci. En tiu ĉi stato k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng pensadis ne pri sia persona sekureco, sed pri la neplenumita tasko en la konstruejo. Antaŭ la foriro, gvidantaj kamaradoj demandis lin pri lia deziro, kaj li diris sincere: “Mi petas, unue, lasi min rapide reveni al la konstruejo tuj post resaniĝo kaj, due, ĉiuokaze ne lasi la kamaradojn viziti min pro la intensa laboro en la konstruejo.”

Post diagnozo de la vundo de k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng, la kuracisto trovis necese amputi lian brakon. Informiĝinte pri tio, li sentis grandan ĉagrenon, pensante ke li ne povos multe servi al la popolo post perdo de unu brako, kaj naskiĝis al li pesimismaj sentoj. Ĉe ekapero de tiu penso, li kiel kutime malfermis la “tri popularajn artikolojn”. Legante la artikolojn, li pensis en si: Prezidanto Maŭ instruas al ni: “**La morto por la interesoj de la popolo estas pli peza ol la monto Tajŝan. . .**” Nun, mi perdos nur la maldekstran brakon, kio grava estas en tio? Ĉu iu povas aŭ ne povas agi laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**Labori senrezerve por la interesoj de la popolo**”, tion decidis ne la korpostato kaj kapableco, sed la ruĝa koro senlime fidela al Prezidanto Maŭ, senlime fidela

al Maŭzedongpenso kaj senlime fidela al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. . . .Kiam li pensis pri tio, multoble kreskis al li la kuraĝo kaj li petis la kuraciston fari la operacion kiel eble plej frue, por ke li povu pli frue reveni al la konstruejo. Por ne ĝeni la kuracistojn kaj flegistinojn, li toleris doloregon kaj ne faris eĉ unu ĝemeton, manifestante la ŝtalan spiriton de komunisto.

Konsiderante la malbonan sanstaton de k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng post la operacio, la gvidantaro timis, ke la intensa laboro en la konstruejo estos tro peza por li, kaj konsilis lin reveni al la patrolando por ripozi. Aŭdinte la konsilon, li decideme diris al la gvidantaro: "Mi volas nepre reveni al mia laborposteno kaj kontribui al la konstrua afero de la tanzania popolo per la restanta mano. Mi ne revenos al mia patrio, antaŭ ol finplenumi la taskon." Poste, la gvidantaro konsentis al li resti tie, kondiĉe ke li ripozu bone.

Post kelktempa kuracado kaj ripozo, k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng petis pri reveno al la konstruejo. En la komenco, la gvidantaro ne konsentis kaj insistis ke li bone ripozu plu. Kun emocio Ĝaŭ Ĝenŝeng diris: "Prezidanto Maŭ kaj la Partio sendis min por helpi la tanzanian popolon en ilia konstruado, sed ne por ripozi. Mi decideme petas reveni al la konstruejo." Vidante la firman decidemon de k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng, la gvidantaro vole nevole devis konsenti al li kaj pacience admonis lin ripozi en la konstruejo sen partopreno de laboro. Post reveno al la konstruejo, li ne povis ripozigi sin kaj ofte iris ŝtele al la konstruejo por kontroli la laboron kaj doni konsilojn por solvi iujn malfacilajn problemojn. Foje, la pumpilo de la konstruejo difektiĝis, tuj li ĝin riparigis. Vidante lian sinforĝesan laboremon, iu tanzania laboristo prenis lian solan manon kaj diris: "Ĉu vi povas ankoraŭ labori en tia stato?" Ridetante li respondis: "Prezidanto Maŭ instruas al ni, ke homo povas havi grandan aŭ malgrandan kapablon, sed se li nur havas la penson servi al la popolo

tutkore kaj tutanime, li povas fari sin homo utila al la popolo. Kvankam mi havas nur unu manon, tamen mi volas fari mian plejblon por servi al la tanzania popolo." La laboristo estis tre kortuŝita de liaj vortoj kaj starigis sian dikan fingron dirante: "Prezidanto Maŭ ja estas vere granda! Prezidanto Maŭ ja estas vere granda!"

Kiagrade k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng bezonas du manojn kiel maŝinisto de konstruaj maŝinoj! Oni povas facile imagi, kiom multe da malfaciloj ekzistas por manipuli maŝinon per nur unu mano! Sed por k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng armita per Maŭzedongpenso, tio tamen estas nenio. Vizaĝe al malfacilo li ĉiam kuraĝigis sin per la instruo de Prezidanto Maŭ: "**Tiu ĉi armeo posedas spiriton nevenkeble marŝi antaŭen, kaj ĝi decidas faligi ĉiujn malamikojn, kaj neniam esti subigita de malamikoj.**" Post hardado en praktiko dum iu periodo, li venkis unu malfacilon post alia per sia obstina revolucia

Ĝaŭ Ĝenŝeng parolas kun aliaj laboristoj por interŝanĝi komprenafajn akiritajn en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ.



spirito, fine povis lerte manipuli diversspecajn maŝinojn unumane, kaj efektivigis sian ĵuron “servi al la tanzania popolo per unu mano”. Iu tanzania laboristo diris: “La ĉinaj specialistoj estas niaj vere bonaj amikoj, kiuj sincere helpas nian konstruadon. Eĉ homo perdinta unu manon ankoraŭ servas al ni. Kiel nobla estas tia spirito!”

La heroo, obstina kaj vivplena revolucia spirito de k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng elmontriĝis ne nur en la pli ol du jaroj, dum kiuj li helpis la konstruadon de fremdlando, sed ankaŭ enlande li jam estis multfoje elektita kiel avangarda produktanto kaj laboristo kun kvin bonoj antaŭ sia iro al eksterlando. En kunsido pri la avangardaj agadoj de k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng, liaj kunbatalantoj citis multajn vivecajn ekzemplojn: Estis li, kiu klopodis sekurigi la vivon de klasaj fratoj riskante mem veneniĝon de gaso dum iu akcidento. Estis li, kiu, spite la bruligan varmecon de varmblova fornego, la unua enrampis ĝin por ripari difektitan blovtubon kaj garantiis la regulan iradon de pro-

Ĝaŭ Ĝenŝeng persiste partoprenas laboron.



dukto. Estis li, kiu saltis en la ĝisoste malvarman akvon por forigi la obstaklon, kiu malhelpis funkciadon de pumpilo. Estis li, kiu kun ruĝa koro por revolucio efektivigis unu teknikan renovigon post alia kaj stimulis daŭran antaŭensalton en produktado.

Kiam li revenis al la patrio post bonega plenumo de sia tasko en helpado al fremda lando, la revoluciaj komitatoj de la konstrua kompanio kaj de la urbo, kie laboras k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng, elmetis la sloganon “lernu de k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng” por alvoki la aliajn lerni de lia internaciisma spirito. Sed, li neniom estas fiera pri siaj meritoj kaj ankoraŭ staras en la unuaj vicoj de batalado kiel ordinara laborulo. Post la publikigo de la instruo de Prezidanto Maŭ “**La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion**”, aktive respondante al la alvoko, li partoprenis en la propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso kaj marŝis en la edukan kampon. Por strikte sekvi la strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng konkeris la

malfacilojn kaŭzitajn de perdo de unu mano kaj malmulta legosciado, ellitiĝas frue kaj enlitiĝas malfrue, serioze studas kaj klopodas bone kompreni ĉiujn proletarajn politikojn de Prezidanto Maŭ kaj faris kontribuon por la Granda Proletara Kultura Revolucio sur la eduka fronto.

Okaze de la Nacia Festo en la pasinta jaro, kiel elstara reprezentanto de la laborista klaso k-do Ĝaŭ Ĝenŝeng venis al Pekino por partopreni la festan solenon kunportante grandajn batalfruktojn kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Ĉijare, kiel elstara reprezentanto de komunistoj li partoprenis la Naŭan Kongreson de la Partio kaj multfoje vidis nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Tio estas la plej granda feliĉo neforgesebla por lia tuta vivo kaj ankaŭ potenca movforto por li en lia kuraĝa batalado.

VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG

(En Esperanto)

Eldonita ankaŭ en la lingvoj albana, angla, araba, bengala, birma, bulgara, ĉeĥa, franca, germana, haŭsa, hindia, hispana, hungara, indonezia, itala, japana, korea, laosa, mongola, nepala, norvega, persa, pola, portugala, rumana, rusa, serba, ŝahilia, taja, tamila, urdua kaj vjetnama.

358 p. en poŝformato de 9×13 cm. kun ruĝa plasta kovrilo

Eldonis: La Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio


Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj),

Pekino, Ĉinio

Havebla ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe Sekcio por Poŝta

Mendo, Guozi Shudian, P. O. Kesto 399,

Pekino, Ĉinio



**Letero de Leganto J. G.
de Ĉeĥoslovakio**

Estimataj geamikoj:

Kun intereso mi tralegis jam du ĉi-jarajn numerojn de EPC kaj mi esprimas dankojn al vi. Certe EPC estas interesa revuo, kiu vere kaj regule informas vastan legantaron de diversaj landoj pri la situacio en Ĉinio, pri la granda popola movado, kiu tre rapide kreskas

sub la genia gvido de via granda Prezidanto Maŭ Zedong. Lia penso estas vere viva kaj grava, ĉar ĝi aktivigis la revolucian entuziasmon de milionoj da amasoj.

Atente mi tralegis artikolon de Jong Vejdong "Nova Caro", kiu prezentas profundan teorian analizon de gravaj ideologiaj, ekonomiaj kaj politikaj problemoj el vidpunkto de Maŭzedongpenso. La priskribitaj problemoj rekte tuŝas nin kaj mi plene simpatias kun konkludoj de la aŭtoro.

Kompreneble ankaŭ la aliaj artikoloj de EPC estas aktualaj kaj interesaj.

En lastaj tagoj mi aŭskultis multajn maltrankvilajn novaĵojn el Ĉinio precipe kio koncernas la incidentojn

inter Ĉinio kaj Sovetio — jen estas malkovrita vizaĝo de la reviziismo kaj reala danĝero, kiu rezultas el ĝi.

Mi volus esprimi miajn profundajn simpatiojn al via lando en tiu rilato. Kaj mi estas konvinka, ke la ĉina popolo defendos sian patrujon kaj ne permesos iun ajn ataki ĝin.

Plezure mi atendas la martan numeron de EPC, por ke mi eksciu veron pri la plej grava problemo de la lastaj tagoj.

La kalendaron kaj aliajn materialojn mi bone ricevis kaj mi sincere dankas.

Akceptu miajn korajn salutojn kaj dezirojn de sukcesoj en via fruktodona laboro.

LEKCIONOJ DE ĈINA LINGVO

阶 級 斗 争 永 不 忘
Jiējí Dòuzhēng Yǒng Bù Wàng
Klasan Batalon por Ĉiam Ne Forgesu

爷 爷 七 岁 去 讨 饭,
Yéye qī suì qù tāofàn,
Avo sepjara iris almozpeti,

紧 跟 领 袖 毛 主 席,
Jǐn gēn lǐngxiù Máo zhǔxí,
Strikte sekvas gvidanton Maŭ Prezidanto,

爸 爸 七 岁 去 逃 荒。
Bàba qī suì qù tāohuāng.
Patro sepjara iris fuĝi malsaton.

阶 级 斗 争 永 不 忘。
Jiējí dòuzhēng yǒng bù wàng.
Klasan batalon por ĉiam ne forgesu.

TRADUKO

今 年 我 也 七 岁 了,
Jīnnián wǒ yě qī suì le,
Ĉi-jare mi ankaŭ sepjara jam,

Por Ĉiam Ne Forgesu Klasan Batalon

高 高 兴 兴 把 学 上。
Gāogāoxìngxìng bǎ xué shàng.
Ĝoje iras lerni.

Estante sepjara, avo iris almozpeti,
Estante sepjara, patro iris fuĝi malsaton.
Ĉi-jare ankaŭ mi jam estas sepjara,
Sed mi ĝojplene iras lerni.
Strikte sekvante la gvidanton Prezidanto Maŭ,
Por ĉiam ne forgesu klasan batalon.

Farso en la Roza Ĝardeno de la Blanka Domo

LA 23-an de majo, en la Roza Ĝardeno de la Blanka Domo, Vaŝingtono, la nova ĉefo de la usona imperiismo Nixon kaj la sovetunia ambasadoro al Usono Dobrinin, sidante ŝultron ĉe ŝultro, kun ĝojego ĝuis la usonan diboĉan muzikon. Ilia tiu ĉi subtila prezento estis profila priskribo de la koluzio inter Usono kaj Sovetunio. La novaĝ-agentejo de Usono informis, ke la koncerto sukcese ludis “harmonian melodion inter Usono kaj Sovetunio”.

Tiutage, en la Roza Ĝardeno de la Blanka Domo, Nixon okazigis “koncerton” por regali la sovetunian ambasadoron Dobrinin en kiu ludis la orkestro de Minnesota Universitato ĵus reveninta post sia “vizitado” en Sovetunio. En ĝuado de tiu ĉi 30-minuta prezento Dobrinin kaj Nixon “kune piedfrapetis en takto kaj manplaŭdis”. Dobrinin foje kaj refoje laŭdis la prezentadon “bonega” kaj “mirinda”.

Fakte, ĝi tute ne estis “koncerto”, sed prezento de koluzio inter Usono kaj Sovetunio per la “koncerto”, kaj plene malkaŝis kiel la sovetunia reviziisma renegata kliko sklave surge-niĝis antaŭ la usona imperiismo. La “harmonia melodio inter Usono kaj Sovetunio” estis ludita ne de la orkestro de la Minnesota Universitato, sed de Dobrinin kaj Nixon mem.

Kortuŝita ĝis larmoj pro la “afabla invito” fare de Nixon, Dobrinin nomis la “koncerton” “iniciato” en la sovetunia-usona rilato. Li diris ankoraŭ, ke la membroj de la orkestro, kiuj partoprenis la prezentadon en Sovetunio, estas ne nur “ eminentaj muzikistoj, sed ankaŭ elstaraj ambasadoroj”, kaj ke iliaj “tonoj estas multe pli belaj ol tiuj de diplomatoj”. Li senĉese laŭdis, ke “la koncerto estas eksterordinara ne pro tio, ke ni aŭskultis tre bonan prezentadon”, sed pro tio ke “ĝi estas tre bona signo kaj tre bona simbolo en la rilato inter niaj du landoj (Sovetunio kaj Usono), kaj mi esperas, ke la rilato inter ni fariĝos ĉiam pli bona” kaj “ĉiam pli intima”.

En sia parolado Nixon diris, ke Usono kaj Sovetunio estas kvazaŭ “naturaj amikoj”, ke ambaŭ landoj devas kune “pliriĉigi la vivon”, “daŭrigi konkurson kiel amikoj”, kaj ĉiam “pensi

pri la aferoj havantaj komunajn interesojn inter ni”. Parolante pri la prezento farita de la orkestro de Minnesota Universitato en Samarkando de Sovetunio, kiu narkotis la sovetunian popolon per diboĉa muziko, Nixon multe laŭdis ĝin kaj diris: “La muzika organizo jam konkeris Samarkandon per neniu pafo.”

La paroladoj de Dobrinin kaj Nixon en la “koncerto” de la Blanka Domo montris, ke la usona imperiismo kaj la social-imperiismo de la sovetunia reviziismo volas intensigi sian pluapaŝan koluziigon pro la komuna kontraŭrevolucia bezono. Sed, ĉar tiuj du imperiismoj estas “naturaj amikoj”, do estas certe, ke ili estas la komunaj malamikoj de la tutmondaj popoloj, inkluzive de la popoloj de Sovetunio kaj Usono. Ĉar inter ili estas “komunaj punktoj” en opono kontraŭ Ĉinio, kontraŭ komunismo, kontraŭ popolo kaj kontraŭ revolucio, do la malfaciloj en- kaj eksterlandaj, sennombraj kontraŭdiroj, sieĝo de krizoj kaj senelireja pozicio, ĉio ĉi tio estas iliaj komunaj mortigaj vundoj.

La trumpetado de la “koncerto” en la Blanka Domo neniel povas kovri la marŝan klarionon de la revoluciaj popoloj tra la tuta mondo. Kaj la senfinaj babilaĉoj de Nixon kaj Dobrinin povas nur vekti ĉe la centoj da milionoj da revoluciaj popolanoj tra la tuta mondo ankoraŭ pli fortan kaj indignan krion: For la usonan imperiismon! For la social-imperiismon de la sovetunia reviziismo!

Dobrinin (maldekstre) flatas al Nixon (dekstre) kaj la lasta kontente ridegas. Tiu aĉa prezento ilia plene ilustras la intensigatan koluzion de la du mondaj tiranoj, la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo.



Senmaskigo de la Teorio de "Socialisma Komuneco" de Sovetuniaj Reviziistoj

LA teorio de "socialisma komuneco" distrumpetata de la novaj caroj de la sovetunia reviziismo kaj la "komuneco de la libera mondo" de la usona imperiismo estas ŝakaloj el la sama nesto. Oni nur rigardu la koloniismajn politikojn de la faŝismaj imperioj Germanio, Japanio kaj Usono, kaj oni jam povas malkovri la reakcian esencon de la tiel nomata "socialisma komuneco" de la sovetuniaj reviziistoj.

Unue, ni rigardu, kia varo estis siatempe la "nova ordo de Eŭropo" de Hitler?

Antaŭvespere de la Dua Mondmilito, la hitlera Germanio senskrupule provis superregi Eŭropon sinapogante sur sia portempa tiel nomata "forteco" ekonomia kaj milita. Ĝi levis la flagon de "starigo de nova ordo de Eŭropo". Kaj sub tiu ĉi flago ĝi okupis la tutan Ĉeĥoslovakion en marto de 1938, invadis pollandon en la 1-a de septembro, kaj poste faris sinsekvajn invadojn al Danlando, Norvegio, Belgio, Nederlando kaj Francio. Samtempe ĝi plurfoje faris militajn invadojn al Jugoslavio kaj Grekio. Sub la flago de "starigo de nova ordo de Eŭropo" la hitlera Germanio okupis en pli ol du jaroj 11 landojn kun totala areo de 2,000,000 kvadrataj kilometroj kaj loĝantaro en totala nombro de 142,000,000. Ĝi superregis la ekonomiajn arteriojn en tiuj landoj, kruele masakris tieajn loĝantojn, precipe en rilato al la slavaj popoloj, kaj devigis ilin fari senpagan laboron en la faŝismaj punlaboraj koncentrejoj. Ankaŭ sub la flago de "starigo de nova ordo de Eŭropo", la hitlera Germanio disŝiris en la 22-a de junio, 1941, la "Traktaton de Reciproka Neinvado inter Sovetunio kaj Germanio" subskribitan antaŭ du jaroj kaj subite lanĉis "fulman militon" kontraŭ la unua socialisma lando Sovetunio. Sub la persona komando de la granda marksist-leninisto kamarado Stalin, la heroa sovetunia popolo faris fortajn batojn rekte al la faŝismaj agresaj agoj de la hitlera Germanio. Fine, la starigo de "nova ordo de Eŭropo", pri kiu kriaĉis Hitler, trafis kompletan bankroton.

Due, ni rigardu, kia varo estis la "starigo de nova ordo de la orienta Azio" elmetita de la japanaj faŝistoj?

En 1940, komence de la Dua Mondmilito, ankaŭ la japanaj faŝistoj ellaboris la agresan planon por "starigo de nova ordo de la orienta Azio". Krome ĝi subskribis kune kun la germana kaj itala imperiismo "Interkonsenton de Triregna Akso", en kiu estis difinite rekoni kaj respekti reciproke la "novan ordon" de respektivaj flankoj. Tiam la elpendigita ŝildo estis "kunprospera sfero de la granda orienta Azio". Kiel dirite, ĝi celis kunigi la diversajn landojn de la orienta kaj suda Azio kun Japanio por "kune ekzisti kaj kune prosperi". Fakte ĝi celis senskrupule engluti la tutan Azion. Post elmeto de tiu ĉi agresa plano, la japana imperiismo lanĉis la Pacifikan Militon en decembro de 1941, kaj tuj poste ĝi okupis Hongkongon, Filipinojn, Vjetnamion, Laoson, Kamboĝon, Tajlandon, Birmon, Malajon kaj Indonezian. En ĉiu fojo, post okupo de iu lando en la "kunprospera sfero", la japana imperiismo tuj proklamis, ke ĉiu potenco milita kaj politika apartenas al la komandejo de la japana okupanta armeo, poste kontrolis ĉiujn grenajn riĉfontojn kaj trafikilojn en la okupita regiono, disponigis al si ĉiujn ekonomiajn rimedojn kaj praktikis la unuigitan monsisitemon de "kunprospera sfero". Kaj al la popolo ĝi praktikis faŝisman regadon. Ĝis printempo de 1942, la areo okupita de Japanio (inkluzive tiun en Ĉinio) atingis 7,000,000 kvadratajn kilometrojn kaj superis dudekoblon de la propra teritorio de Japanio, kaj la nombro de la popolanoj de ĝi sklavigitaj atingis ĉirkaŭ 500,000,000 kaj superis kvinoblon de la loĝantaro de Japanio. Tamen, la japana militarismo publikigis skizan mapon de "kunprospera sfero de la granda orienta Azio": rondo kun radio de 4-5 mil kilometroj kun Tajvan kiel la centro. La kontraŭfaŝisma batalo de la ĉina popolo kaj la popoloj de la mondo komplete frakasis la intrigon de "kunprospera sfero de la granda orienta Azio" de la japana militarismo, kaj fine bankrotis la bela sonĝo de la japana militarismo.

En la fino ni rigardu, kia varo estas la “komuneco” elmetita de la du nukleaj hegemoniaj potencoj: la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo?

Post la Dua Mondmilito Usono transprenis la faŝisman pozicion de Germanio, Japanio kaj Italio kaj elmetis unu post alia la agresajn planojn de “starigo de internacia registaro” kaj “starigo de la komuneco de libera mondo”. En sia mesaĝo pri la stato de unio en 1962, Kenedy kriaĉis: “Nia fundamenta celo restas ankoraŭ tia: formi pacan mondan komunekon el liberaj kaj sendependaj landoj.” En sia fifama “inaŭgura parolado”, Nixon jam en la komenco elmontris sian kontraŭrevolucionan ferocan fizionomion.

Por efektiviĝi sian agresan planon de la “komuneco de libera mondo”, la usona imperiismo plene aplikas sian kontraŭrevolucionan duoblan taktikon kaj faris damnindajn krimojn al la popoloj de la mondo. Unuflanke, ĝi ofertas “usonajn helpojn” kaj ekspedas “pacajn korpusojn” kaj, aliflanke, ĝi subtenas la banditan klikon de Ĉiang Kajŝek por masakri la ĉinan popolon kaj perforte okupas nian teritorion Tajvan, lanĉis agresan militon kontraŭ Koreio, faris armitan invadon al Libano, armite agresas Vjetnamion ktp. ktp. Ĝi ankaŭ starigis centojn kaj milojn da militaj bazoj en diversaj lokoj de la mondo formantaj kolosan reton de militaj bazoj. Ĝis 1961, la militaj bazoj kaj militaj konstruaĵoj de Usono en fremdaj landoj nombris 2330, inkluzive 150 ĉefajn militajn bazojn. La armeanoj de Usono ekspeditaj en transmaraj bazoj kaj eksterlandaj teritorioj nombris ĉirkaŭ 1,100,000 personojn, kiuj konsistigis 40 procentojn de la totalo de la armitaj fortoj de Usono. En la lastaj jaroj pli kreskis la nombroj. Por formi la “komunekon de libera mondo”, la usona imperiismo plenenergie superregas siajn tiel nomatajn “aliancantojn”, kiaj Britio, Francio, okcidenta Germanio, Japanio, Italio, Belgio k. c., por kapti la ekstreme vastan mezan zonon inter Usono kaj la socialismaj landoj kaj plie fari renversadon, subfosadon kaj agresadon al socialismaj landoj.

La sovetunia reviziisma renegata kliko estas komplico kaj lakeo de la usona imperiismo. De la lastaj jaroj ĝi senskrupule distrumpetas la teorion de “socialisma komuneco”. Ĉiu lando, kiu partoprenas la “komunekon”, devas esti submetita al la tiranado kaj dispono de la “patriarka partio”—la sovetuniaj reviziistoj. La sovetuniaj reviziistoj laŭvole prirabas kaj barbaramente subpremas orienteŭropajn landojn kaj la Mongolan Popolan Res-

publikon. Tio, ke la ĉeĥoslovaka reviziisma renegata kliko intencis rekte kontakti kun la usona imperiismo, ofendis la “patriarkan partion” de la “komuneco”, kaj la sovetuniaj reviziistoj tuj ekspedis trupojn en nombro de centoj da miloj por okupi Ĉeĥoslovakion. Por ekspansiigi la “socialisman komunekon”, la novaj caroj de la sovetunia reviziismo eĉ faris armitajn agresojn al la regiono de Ĝenbaŭ-insulo de nia lando. Ili opinias iliaj la lokojn, kiujn jam okupis la malnovaj caroj, kaj ili opinias ankaŭ iliaj la lokojn, kiujn la malnovaj caroj ankoraŭ ne okupis. La apetito de la agresemaj novaj caroj ja estas pli granda ol tiu de la malnovaj caroj. La faktoj pruvis, ke la flago de “socialisma komuneco” levita de la sovetunia reviziismo, tute same kiel la “komuneco de libera mondo” de la usona imperiismo, celas prirabi koloniojn.


Estas same “belaj” flagoj, kiaj “nova ordo”, “kunprospero”, “libero” kaj “socialismo”, kaj unu sonas pli alloge ol alia!

Estas same krimaj agoj, kiaj agresado, sklavigado, okupado kaj prirabado, kaj unu estas pli feroca ol alia!

Estos sama la mizera fino: **“Subfosado, malsukceso, denove subfosado, denove malsukceso, kaj tiel ĝis pereco — jen estas la logiko de imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj tra la mondo en rilato al la afero de la popolo, kaj ili neniam iros kontraŭ tiu ĉi logiko.”**

“Historia sperto meritas atenton.” Siatempe la germana faŝismo kaj japana militarismo kiuj levis respektive la flagojn de “nova ordo de Eŭropo” kaj de “kunprospera sfero de la granda orienta Azio”, estis la ĉefkrimuloj, kiuj provokis la Duan Mondmiliton; hodiaŭ, la sovetunia reviziismo kaj la usona imperiismo kiuj plenenergie distrumpetas la tiel nomatajn teoriojn de “komuneco”, same estas la katastrofa fonto de milito. Se ili nepre volas militon, ni firme regalos ilin dece ĝis la fino. La historio jam pruvis, ke la iam senrivalaj “nova ordo de Eŭropo” kaj “kunprospera sfero de la granda orienta Azio” estis frakasitaj en la kontraŭfaŝisma popola milito. La historio estas pruvanta, ke la “komuneco de libera mondo” kaj “socialisma komuneco” jam alfrontas sian finon de disfalo kaj de ribelo de sia sekvantaro. La historio certe daŭre pruvos, ke en la sonado de triumfaj kantoj de venka antaŭenmarŝo de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso al la venko tra la tuta mondo, la du “komunecoj” de la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo estos komplete enterigitaj, same kiel la du “novaj ordoj” de Germanio kaj Japanio siatempe!

Jen "Socialisma Komuneco" de Sovetunia Reviziismo



Tiuj fotoj ricevitaj el Ĉeĥoslovakio malkovras per feraj faktoj la reakcian esencon de la teorio de "socialisma komuneco", "internacia diktaturo" kaj "limitita suvereneco" antaŭenpuŝata de la sovetunia reviziisma social-imperiismo kaj spegulas la senkomparan malamon de la ĉeĥoslovaka popolo kontraŭ la sovetuniaj reviziismaj agresantoj.

La popolo de Ostrava forte protestas kontraŭ la social-imperiismo de la sovetunia reviziismo, kiu okupas ilian patrolandon.

Sovetunia reviziisma social-imperiismo rabas de Ĉeĥoslovakio uranian ercon en granda kvanto sub la ŝildo de "interhelpo kaj kunlaboro". La urbanoj proteste aŝiŝas sur la tanko de sovetunia reviziismo: "Iru hejmen, uranio jam ne estas!"




Indignaj popolamasoj ĉirkaŭsieĝas kaj haltigas tankon de la sovetunia reviziisma armeo, kiu entrudiĝis en la urbon.






Ostravaj gejunuloj hurlas: For sovetuniajn soldatojn!



“Sovetuniaj soldatoj foriru hejmen!” Ĉie estas videblata slogano en Ostrava.

*Sovetuniaj reviziismaj agresantoj renkontas ĉie proteston.
Urbanaj severe riproĉas iliajn agresajn krimojn.*





Onklino Li Pistadis Rizon

SUN JEN

EN la jaro 1931, post kiam japanaj diabloj perforte okupis la Nordorienton de nia lando, ĉiam aŭdiĝis proksime al la vilaĝo Sangianfang en Hajlong-gubernio la sonado "bonden, bonden" de sur Pingding-monto, kiam regis silento en profunda nokto kaj la ĉielo estis plena de steloj. El tio la vilaĝanoj komprenis, ke onklino Li pistas rizon por la Kontraŭjapana Unuigita Armeo.

Onklino Li estis homo tre malcedema kaj nefleksebla. Post la eniro de japanaj diabloj en la Nordorienton, la onklino instigis siajn edzinojn kaj filinojn partopreni la Kontraŭjapanan Unuigitan Armeon gvidatan de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj ĉiutage ŝi iradis en arbaron sur Pingding-monto por porti rizon al la trupoj kun porcelana vazo sur sia kapo. Por rompi la grenan provizadon al la Kontraŭjapana Unuigita Armeo, la japanaj diabloj fermis ĉiujn muelilojn al uzado, kaj sen permeso de policejo, neniu ajn rajtis ilin uzi por senŝeligi rizon aŭ fari farunon. La diabloj povis fermi tiujn muelilojn, sed ne la fortajn manojn kaj rapidajn kruojn de onklino Li. Ŝi faris sur ligno kavon, en kiu ŝi ekpistis rizon en sia malgranda pajla kabano kun la sonado "bonden, bonden"; ekde apero de steloj sur la ĉielo ŝi pistadis ĝis tagiĝo; kaj poste ŝi surmetis la brilan vazon sur sian kapon, supreniris al Pingding-monto, kaj en palpebrumo jam malaperis en la arbaro. Eksciinte, ke onklino Li pistas rizon por la Kontraŭjapana Unuigita Armeo, la vilaĝanoj ŝtele portis sian rizon al la kabano de la onklino.

Kun la paso de longa tempo, tion eksciis lakeoj de la diabloj. En iu tago la lakeoj venis kaj forkaptis la onklinon. Ja tre kruelaj estis tiuj lakeoj! Ili torturis kaj esploris onklinon Li tri tagnoktojn, batante ŝin per pun-lato kaj vipo. Sed, nenion la onklino malkaŝis al ili, kvankam ŝi trifoje svenis. La lakeoj tiel koleris, ke ili dishakis ŝian rizpistujon, faligis ŝian kabanon kaj ŝin forpelis.

Onklino Li lame revenis al la vilaĝo. La vilaĝanoj kuracis ŝiajn vundojn, alportante jen medikamenton jen akvon. Ne plene resaniĝinte, ŝi jam malsupreniris kaj faris kavon sub la tero ĉe la montpiedo; kaj tie ŝi rekomencis pistadon de rizo en pistujo farita el salika stumpo. Kiel antaŭe, ŝi rizpistadis "bonden, bonden" de apero de steloj sur la ĉielo ĝis tagiĝo, kaj poste ŝi portis la vazon sur la kapo, suriris Pingding-monton kaj en palpebrumo jam malaperis en la arbaro. Informiĝinte ke la onklino ree pistas rizon por la Kontraŭjapana Unuigita Armeo, la vilaĝanoj denove portis rizon al ŝia subtera kavo.

Post kelka tempo, la naciperfiduloj de la gubernio ricevis informon pri tio kaj ree kaptis onklinon Li. Ĉifoje, la malamikoj ankoraŭ pli kruele torturadis ŝin dum la daŭro de ses tagnoktoj. Ili eĉ elektrumis ŝin, ligis ŝin per ŝnurego kaj ŝin pendoligis tien reen en la aero. Ili tiel torturis ŝin, ke ŝi sesfoje svenis. Tamen, la onklino eldiris nenion al la malamikoj. Furiozante de kolero, la naciper-

fiduloj detruis ŝiajn pistujon kaj subteran kavon kaj elpuŝis ŝin.

Onklino Li revenis al la vilaĝo rampante. La vilaĝanoj zorgeme flegis ŝin, helpante ŝin eĉ en fekado kaj urinado. Antaŭ plena resaniĝo, ŝi ree fosis kavon en monto kun la helpo de la vilaĝanoj, mem ĉizis kavon sur ŝtono kaj ekpistis rizon kun la sonado "bonden, bonden" de ekapero de steloj ĝis tagiĝo. Poste ŝi kapportis la vazon al Pingding-monto kaj en palpebrumo jam malaperis en la arbaro. Eksciinte ke ŝi ree pistas rizon por la Kontraŭjapana Unuigita Armeo, oni ree portis rizon al ŝia montkavo.

Post longa tempo, pri tio eksciis japanaj diabloj. Iun tagon, venis pluraj diabloj kaj ree forkondukis onklinon Li. Ili torturis ŝin naŭ tagnoktojn, kaj naŭfoje ŝi svenis. Sed, firme kunpremante siajn lipojn, ŝi eldiris neniun vorton. Tiel kolorigitaj la malamikoj enterigis onklinon Li vivan.

Ĉiuj vilaĝanoj maltrankviliĝis pri onklino Li, kaj nokte kiam la diabloj estis jam for, ili iris kun ŝoveliloj kaj pioĉoj al la loko, kie la onklino estis enterigita, sed la tero jam estis malfermita: iuj jam pli frue forsavis ŝin.

Ĉar en tiu nokto, batalantoj de la Kontraŭjapana Unuigita Armeo savis onklinon Li. Poste, ŝi estis akceptita en la armeon por tie labori. Onklino Li estis homo ne povanta resti senokupa, tial ŝi petis helpon de batalantoj por ĉizi kavon sur ŝtono kaj ree ekpistis rizon kun la sonado "bonden, bonden".



Ruĝa Signal-lanterno

Kolektive adaptita de la Ĉina Pekin-opera Trupo

SCENO 9 HELPO DE LA AMASO

Tuj post la lasta sceno.

Domo de Li Juhe. Sur la pordo estas sigelslipoj disŝiritaj. La ĉambro restas senŝanĝa, tamen ĝin regas dezerta silento.

Kiam la kurteno leviga, Tiemej staras sin apogante sur la pordo en la ĉambro. Rigardinte ĉirkaŭen, ŝi krias: "Paĉjo! Avinjo!" Subite ŝi falas al la tablo kaj ploras. Iom poste, ŝi malrapide stariĝas, vidas la signal-lanternon kaj prenas ĝin.

Tiemej: Ho, ruĝa lanterno, nun mi denove vidas vin, sed neniam plu paĉjon kaj avinjon! Avinjo, paĉjo! Mi jam komprenas pro kio vi mortis. Mi daŭrigos vian aferon kaj estos heredanto de la ruĝa lanterno! Ho, Hatojama! Vi lasis min reveni, tio estas via intrigo, ĉar vi ne akiris la ĉifrolibron. Vi povas min aresti aŭ liberigi laŭ via volo, sed vi neniam povos akiri la ĉifrolibron! (Demetinte la ruĝan lanternon kaj ordiginte sian harligon ŝi kantas.)

*Je penso pri l' japandiablo, miaj pulmoj kreas!
Dentgrincigante la indignon regi nun mi devas
Por kapti l' ĉifrolibron, la bandito Hatojama
pen-intrigis,*

*Kaj mian patron kaj avinon pafmortigis.
En malespero Hatojama min per mort' minacis,
Sed mortospite, lin ignori mi aŭdacis.
Mi maĉis la malamon kaj englutis spite mian
volon,*

*Kaj ĝi burĝonos eniĝinte en la koron.
Mi ne ploretas kaj ne lasas larmojn sur la vangoj
flui,*

*Ke ili fajreriĝu en mi, por ekbruli
Kaj levi dekmilfutajn flamojn de kolero,
Por bruldetruĝi tiun ĉi malluman teron.*

*Pretigis mi jam por danĝeroj,
Mi timas nek areston, nek ellason, nek skurĝa-
don, nek karceron!*

*La ĉifrolibron mi ne donos, eĉ se mi 'stos fra-
kasita!*

*Atendu vi, bandito Hatojama! Jen respondo
mia pripensita!*

(*Ŝi purigas la signal-lanternon kaj subite aperas ĉagreno en la koro.*) Avinjo, paĉjo! Mi foriras nun. Ĉi tie jam ne plu estas nia hejmo. Tamen la ruĝa lanterno por ĉiam apartenos al ni. La ĉifrolibron mi nepre sendos al la Norda Monto kaj mi nepre venĝos vin. Do vi trankviliĝu! (*Ŝi prenas la signal-lanternon kaj volas eliri.*)

Aŭdinte la ploron de Tiemej onklino Liu kaj Gujlan venas tra la terlita breĉo por ŝin vidi.

Gujlan: Tiemej!

Tiemej: Fratino Gujlan!

Gujlan: Mia patrino venas por vidi vin.

Onklino Liu: Tiemej!

Tiemej: Onklino!

Onklino Liu: Kie estas viaj paĉjo kaj avinjo, Tiemej?

Tiemej: Onklino... (*Ŝi sin jetas en la sinon de onklino Liu kaj ploras.*)

Onklino Liu: Mi komprenas jam. Tiuj bestoj! Ni vidos kiom longe daŭros via tiranado! Spiono ekstere, Tiemej, kaj vi ne povas eliri tra la pordo. Do vi eliru tra nia terlita breĉo! Tuj demetu viajn vestojn kaj interŝanĝu ilin kun tiuj de Gujlan!

Gujlan: Rapidu!

Tiemej: Ne, onklino, fratino, mi ne devas porti danĝeron al vi!

Onklino Liu: Knabino! (*Helpante Tiemej ŝanĝi vestojn.*)

*La povrajn zorgas ĉiam nur la homoj en mizero,
Maldolĉaj du kukurboj kreskas sur la sama
tigo,*

*Ni devas vin elsavi el la faŭk' de tigo,
Ke poste vi rapidu al espero.*

Nun ili jam estas en la interŝanĝitaj vestoj.

Tiemej: Sed kion fari, se malfeliĉo okazos al vi, onklino kaj fratino?

Onklino Liu: Tiemej! Ĉiuj viaj familianoj estas bonuloj. Kvankam mi ne povas kompreni multon, tamen tion mi scias. Kiom ajn granda estu la risko, mi nepre helpos vin foriri sekure. (*Ŝi ploras.*)

Tiemej: Onklino!

Gujlan: Iru tuj. (*Ŝi donas la signal-lanternon al Tiemej.*)

Tiemej: Mi neniam forgesos vin, fratino kaj onklino!

Onklino Liu: Rapidu, knabino!

Kun la ruĝa lanterno Tiemej eniras post la terlitan kurtenon.

Onklino Liu: Estu multe singardema, Gujlan. (*Ŝi iras post la terlitan kurtenon kaj foriras.*)

Gujlan volvas la skarpon de Tiemej ĉirkaŭ sian kolon, paŝas el la domo kun la korbo kaj foriras. Iu spiono tuj alvenas kaj ŝin sekvas.

Envenas la tranĉil-akrigisto. Kiam li ekvolas krii, subite li rimarkas ke malproksime iu spiono sekvas Tiemej (t.e., Gujlan), kaj li ilin sekvas.

— La kurteno falas.

SCENO 10

PUNO AL LA PERFIDULO

Tuj post la lasta sceno.

La strato.

Kiam la kurteno leviĝas, envenas Vang Lian-gju kaj pupaj policisto A. B. C. Iu spiono envenas de alia flanko.

Spiono C: Patrolestro Vang, mi perdis Li Tiemej!

Vang: Kio?

Spiono C: Ŝi foriris!

Vang: Stultulo! (*Li vangfrapas lin.*) Jes! Ŝi certe kuras al la Norda Monto. Telefonu al estro Hatojama kaj petu lin sendi helpotrupon al la vojo al la Norda Monto. Kaj vi iru kun mi por ŝin kapti! Li Tiemej! Hm, Li Tiemej! Mi kredas, ke vi ne povos eskapi el miaj manoj!

Mallumiĝas por ŝanĝo de la sceno. La norda antaŭurbo de Longtan. La vojo al la Norda Monto.

Envenas majstro Ĝoŭ kun gerilano A.

Envenas Tiemej kun la signal-lanternon kaj renkontas ilin.

Tiemej: Onklo Ĝoŭ!

Majstro Ĝoŭ: Tiemej!

Tiemej: Fine mi trovis vin. Miaj paĉjo kaj avinjo ... (*Ŝi ploras.*)

Majstro Ĝoŭ: Ni informiĝis pri ĉio. (*Paŭzo.*)
Ne ĉagreniĝu, tenu la doloron en la koro.
Ĉu vi kunportas la ĉifrolibron?

Tiemej: Mi jam elprenis!

Majstro Ĝoŭ: Bone.

Haste envenas la tranĉil-akrigisto.

Tranĉil-akrigisto: Ĝoŭĉjo.

Tiemej: Onklo tranĉil-akrigisto.

Tranĉil-akrigisto: Ah, Tiemej, kial mi baldaŭ perdis vin?

Tiemej: Onklo! Mi povis eldanĝeriĝi nur dank' al la helpo de la najbara fratino Gujlan. Ŝi alivestis sin en min kaj forlogis la spionon, tiel ke mi povis sekure elpreni la ĉifrolibron kaj veni ĉitien!

Majstro Ĝoŭ: La familio de Liu Gujlan certe altiros la atenton de la malamiko. (*Al gerilano A*) Fengĉjo, iru kaj helpu ilin tuj translokiĝi.

Gerilano A: Bone! Mi tuj iru. (*Foriras.*)

Subite ekfajfas policaŭto.

Tranĉil-akrigisto: Ĝoŭĉjo, venas la malamikoj!

Majstro Ĝoŭ (*al la tranĉil-akrigisto*): Ne gravas, mi jam faris bonan aranĝon. Mi prolektu Tiemej iri al la Norda Monto, kaj vi regalu ilin.



Tranĉil-akrigisto: Ni nepre plenumos la taskon.

Foriras majstro Ĝoŭ kaj Tiemej. Envenas Vang Lian-gju kaj pupaj policistoj A, B, C, D.

Vang: Ho! Flanken!

La tranĉil-akrigisto forjetas la stablon kaj piedfrape forflugigas la pistolon el la mano de Vang. Envenas gerilanoj.

Bajoneta batalo. Vang Lian-gju kaj pupaj policistoj ĉiuj estas mortigitaj.

Ekfajfas policaŭto. Mallumiĝas.

—La kurteno falas.

SCENO 11 LA TASKO ESTAS PLENUMITA

Tuj post la lasta sceno.
La Norda Monto.

Kiam la kurteno leviĝas, muziko eksonas kaj daŭras kontinue. La montoj sur dekoracia tolo estas

altaj kaj krutaj, sed ne timigaj. La gerilanoj staras en vicoj kiuj sin etendas ĝis post la monto. Ili estas multnombraj kaj staras sur kompare ebena deklivo. Sur la talio de la monto staras granda ruĝa flago, kaj sub ĝi estas gardistoj.

Post la leviĝo de la kurteno, alvenas taĉmentestro Liu kaj kelkaj respondecaj kadroj de sur la deklivo. Envenas la tranĉil-akrigisto. Li vidas taĉmentestron Liu kaj montras la direkton de kie li alvenas. Envenas majstro Ĝoŭ kaj Tiemej. Kiam Tiemej vidas taĉmentestron Liu, ŝi donas al li la ĉifrolibron per ambaŭ manoj.

Tiemej levas la signal-lanternon. Taĉmentestro Liu gvidas la trupon ascendi la deklivon kaj sur ĝi haltas. Tiemej alte tenas la ruĝan lanternon. Ruĝiĝas la tuta scenejo kaj malrapide falas la kurteno.

Supre estas nur movoj. Oni ne kantas nek parolas, kaj la muziko devas esti forta.

— FINO

Sur la kovrilo:

Per siaj kolektivaj fortoj la Ŝuangkiaŭ-a Popola Komunumo efektivigis mekanikigon de la produktaj laboroj de plugado, rikoltado, degrajnado ktp. Jen ĝiaj membroj sark-plugas maizkampon per traktoroj.

Sur la dorskovrilo:

Traktora grupo de la Liugi-a Popola Komunumo de Hinĝoŭ-gubernio, Hubej-provinco, transportas senĉese bezonatan materialon al konstruejo de akvoutiliga konstruaĵo.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 9 (134) 1969

Ĉefa Enhavo

Antaŭen sur la Vojo de Sendependeco kaj Memstareco,
Sinapogo sur Propraj Fortoj

Himno al Sinapogo sur Propraj Fortoj

Ŝanĝigo de Fiŝista Vilaĝo

Denova Riĉa Rikolto de Tritiko en Nia Lando

Nia Ŝtato Estas Senŝulda Ŝtato en la Mondo

“Nekuracebla Malsano” Jam Venkita

Heroaj Limgardaj Batalantoj

Gardstarantoj sur la Montaro Himalaja

Timi Nek Penadon Nek Morton

Ruĝa Propagandistino Anĝirhan

“Mi Ne Revenos al Mia Patrio antaŭ ol Finplenumi la
Taskon!”


Farso en la Roza Ĝardeno de la Blanka Domo

Senmaskigo de la Teorio de “Socialisma Komuneco” de
Sovetuniaj Reviziistoj

Ruĝa Signal-lanterno (*pekina opero*)

Nova Metiaro

Malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj plej amas legi verkojn de Prezidanto Maŭ. (*chuosha*—speco de brodaĵo)





Ĉijara Printempa Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio

En la sonado de triumfa kanto pri la grandaj venkoj de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj en la ĝojigaj tagoj de solena okazigo de la 9-a Kongreso de nia partio inaŭguriĝis la foiro en Kantono. La ekspoziciaĵoj estis tre riĉaj. Per grandnombraj agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj kaj novaj industriaj produktaĵoj, ĝi elokvente pruvis ke niaj industria kaj agrikultura produktoj atingis brilajn sukcesojn. Ĝi montris la ekstreme grandan potencon de nia Granda Proletara Kultura Revolucio, kiu malfermis senlime vastan horizonton por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, kaj montris la novajn venkojn akiritajn de nia popolo en la firma efektivigo de la principo **“teni la revolucion, stimuli la produkton”** sub la gvidado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Supre: Kun sento de respekto la gastoj vizitas la ekspozician salonon de ruĝaj trezoraj libroj.

Sube: La solena inaŭguro de la foiro





Tiu modelo de 125,000-kilovata vaporturbina generatoro kun duobla akva interna malvarmigo farita en la sama grandeco kiel la realaĵo ĉiam altiras la atenton de la fremdlandaj amikoj.



Fremdlandaj amikoj elektas aĉetotajn ĉiutagajn uzaĵojn.



Lanteksajoj en la ekspozicia salono de malpeza industrio.



La nova tipo de nia traktoro kun progresinta nivelo interesas la gastojn.

Libana komercisto (la dua de dekstre) fervore laŭdas la grandajn atingojn de Ĉinio en diversaj flankoj, kiam li interparolas kun ĉinaj reprezentantoj por aĉeti skribobjektojn.



